

nova

KONTAKTO

n-roj 239/240

28 paĝoj

Restu malsata

Restu naiva

La parolado de
Steve Jobs

Maĉupikĉuo

Vojaĝo al perdita
urbo

**Pacon per
muziko**

JUNECO

Ĉu la plej bona aĝo?



Intervjuo kun Eric Languillat de Inicialoj DC

tejo

Tutmonda Esperantista
Junulara Organizo



tejo.org



MANĜI, TRINKI KAJ MEMBRI EN TEJO

Tri bazaj nepraĵoj por povi ĝui la vivon. Ni provu menci
kelkajn kialojn, kial bonas esti individua membro en
TEJO, kvankam ili multegas: Vi estas en kontakto kun
tutmonda juna E-komunumo; malkovriĝos al vi bunta
kultura diverseco pere de la renovigita revuo Kontakto,
kiun ĉiu membro ricevas; tutmonde gastigas kaj
gastas pere de Pasporta Servo kaj vi ankaŭ povas pli
favorpreze aliĝi al IJK, la plej granda renkontiĝo de junaj
esperantistoj el la tuta mondo.

Ĉion pri aliĝo al TEJO vi trovas ĉe:

<http://www.tejo.org/eo/membrigho>



Dumonata socikultura revuo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), eldonata de Universala Esperanto-Asocio (UEA).

Fondita en 1963.

N-ro 239,240 (2010:5,6), 45-a jarkolekto

ISSN 0023-3692.

Legata en ĉ 90 landoj.

TTT-pago: <<http://kontakto.tejo.org>>.

Eldonanto (administrado, abonoj, anoncoj):
UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@co.uea.org>.

Redakcio: Kontakto, Rua José Guidini Jr, 229, Ribeirão Preto, SP, Brazilo, 14093-540 <kontakto@tejo.org>

Redaktoro: Rogener Pavinski (Brazilo)

Enpaŝigo: Romulo Felício (Brazilo)

Korektisto: Rob Morbeek, Ionel Onet (CO de UEA)

Presado: Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), <skonpres@poczta.onet.pl>

Konstantaj kunlaborantoj: Ĉu vi ekde nun? Joel Amis (Usono), Tatjana Auderskaja (Ukrainio), Daniel Richard Bebelacqua Acosta (Urugvajo), Daniele Binaghi (Italio), Olivier Gaudefroy (Francio), Etsuo Miyoshi (Japanio), Olubunmi Osho-Davies (Niĝerio), Maksim Petrov (Kazaĥio), Saliko (Finnlando), Aneta Ubik (Germanio), Jefim Zajdman (Ukrainio). Facilingvaj Artikoloj estas verkitaj en la niveloj tre facila kaj facila, laŭ la vortolisto de Kontakto. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujare.

Anonctarifo: tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas makleraĵon de 30%. Por anoncoj bv. kontakti UEA.

Anoncetoj: por Anonctabulo 0,25 EUR por unu vorto. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA.

Abontarifo: Varias laŭlande. Petu informojn de UEA.

Malfortvidantoj: povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Salahutuplein 40, NL-5262 ZN Vught, Nederlando.

Kontakto en radioj: Regiono / tempo (UTC) / metroj / frekvencoj (kHz): Radio Havano (Kubo) Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio / 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; Eŭropo Mediteranea / 19:30, 22:00/21/13 715; <<http://216.138.240.229/rc4>> (je la 15-a horo UTC), <http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html> (laŭ mendo tra la servilo de Aŭstria Radio Internacia).

La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.

Redakcie

Nun vi havas nin en viaj manoj. En la pasinta oktobro mi ricevis la taskon fariĝi ĉefredaktoro de Kontakto kaj jen por la unua fojo mi staras antaŭ vi sur ĉi tiu paĝo. Mi konfesas ke la ĝojo-sento, dum ni laboradis por pretigi ĉi tiun numeron, iom post iom cedis lokon al respondeco-sento, kiu nun estas sur ni. Sed ni ĝoje kaj respondece multe laboregis.

En ĝi estas multaj novaĵoj, kiujn vi mem dum la foliumado malkovros. Tute ne estas facile el preskaŭ nulo rekomenci, sed en rekorda tempo ni preparis tiun ĉi duoblan numeron, kio signifas ke jam en 2011 la eldonoj venos akurate kaj ne plu estos malfruoj. Vi nepre rimarkos kiom bela nia revuo fariĝis, la legado certe fluos pli ĝue kaj plezure. Por helpi min en tiu tasko mi havis gravan kunlaboron de Romulo Felicio, kiun kelkaj konas de la koncertoj de Supernova en 2009. Li tre entuziasme akceptis plenumi la enpaŝigon kaj eĉ kunlaboris al unu el niaj rubrikoj.

Nun vi havas nin en viaj manoj. Antaŭ viaj okuloj estas revuo, kiu naskiĝis antaŭ 47 jaroj. Ĉu vi povas imagi tion? Malmultaj el vi naskiĝis antaŭ ĝi, sed malgraŭ tio ĝi estas tutnove naskiĝinta bebo.

Nova Kontakto. Ne temas pri finita laboro. Ni rigardu antaŭen.

En 2011 mi havos la plezuron kundividi ĉi tiun revuon kun Nicola Ruggiero, kiu redaktos la paĝojn de Tejo tutmonde, kunigota kun Kontakto. Viaj sugestoj, ideoj kaj komentoj estas tre bonvenaj por la estonto kaj plibonigo de nia revuo. Ni bezonas vin. Tiu ĉi revuo estas via, ne nur tiu ĉi numero, kiun vi tenas enmane, sed la spiriton de Kontakto vivigas viaj kontribuoj kaj kunlaboraĵoj.

Fine mi dankas al ĉiuj, kiuj sendis gratulajn mesaĝojn, al tiuj, kiuj fidis je mi, al Paŭlo Moĵajev, al TEJO, UEA kaj ĝia CO, kiuj kun helpemo al ni ebligis liveri renovigitan Kontakton.

Vi havas nin en viaj manoj. Nun estas via ŝanco.

Ĝis baldaŭ!

Rogener Pavinski




Foto: Manuel Pancorbo

ENHAVO

Reagoj, novaĵoj 4

Intervjuo

Inicialoj DC 5



Kulturo

Pacon per muziko 8



Ĉefartikolo

Juneco 10

Vivo

Restu malsata.

Restu naiva 12



Vojaĝo

Maĉupikĉuo 16

Folkloro

Unu metio pli valoras ol mil trezoroj 18



Fikcio

Intermonda invado 20

Poezio

Jorge Luis Borges 21

Kinarto

Ĉu kopirajto mortigas Esperanton? 22



Facila

Aktori: Belega sperto por ĉiuj 23

Humuro 24



Moderna Mondo

6 kontraŭ ŝtelistaj akcesoraĵoj 25





Ĉi tie ni publikigas reagojn pri la antaŭlasta numero (237) ĉar Kontakto atingas kelkajn landojn pli malfrue ol aliajn. Tiel estas sufiĉa tempo por ĉiuj legi kaj komenti ĝin.

Ni estas 6 turkaj esperantistoj, kiuj dum la kurso en la civitana instituto de Aurala legis la artikolon pri homeopatio en la revuo Kontakto n-ro 237. Estas tre bona afero ke Kontakto elprenis interesajn temojn, kiel ekz. homeopation. Laŭ nia opinio la artikolo estas instruema.

Nia scio pri homeopatio pliiĝis kaj ni ankaŭ lernis multajn novajn vortojn.

Eeva NIKOSKELAINEN
Turkio

Mi ĵus legis vian artikolon pri homeopatio esperantigitan en la gazeto Kontakto. Mi tre ĝuis ĝin! Mi jam legis diversajn artikolojn, kiuj malpruvas homeopation, sed via estis unu el la plej ĝuindaj, koncizaj, klaraj, kiujn mi povas rememori, kun multaj bonaj ekzemploj kaj ar-

gumentoj. Dankon pro la ĝuinda artikolo!

Russ WILLIAMS
Usono/Pollando

Jen tipa artikolo, kiu komenciĝas per bazaj sciencaj scioj eĉ laŭdaj pri io kaj finiĝas per konfuziga miksaĵo de malvero kaj troigo. Ĉu por manipuli nin?

Mi iris dum 30 jaroj al alopatoj, poste ŝanĝis pro la edzino al homeopato.

(Laŭ la artikolo) antaŭe ĉiuj medikamentoj funkciis per scienco, kaj de 20 jaroj ili funkcias nur per kredo (placebo).

Bert SCHUMAN
Francio

La nuna scienco ne scias pri principoj de materio. Oni konsi-

deras la bazojn de materio kiel la konatajn atomojn, sed kelkaj studoj, kiuj ne estas nuntempe konsiderataj de la oficiala scienco, montras plej intimajn karakterojn de la materio, t.e. ke ekzistas subniveletoj de la materio, kiujn oni ne konsideras nuntempe. Tial, la simpla analizo pri kvanto de la substanco post la sinsekvaj diluaĵoj kondukas nin al miskompreno pri la efiko kaj agado de materio en subniveletoj.

Rodrigo de C. MENDONÇA
Brazilo

Kiel videblas, la artikolo pri homeopatio en n-ro 237 vekis multajn reagojn. Do, por montri ambaŭ flankojn estonte ni publikigos favoran artikolon pri homeopatio. Ni jam bonvenigas kontribuojn.

NOVAĴOJ

Retejo

En oktobro la revuo Kontakto ricevis sian lokon en Interreto. La lanĉo de la retejo kontakto.tejo.org estas unu el la novaĵoj, kiujn planis TEJO kaj la redaktoro Rogener Pavinski por la modernigo de la revuo.



La retpaĝo celas videbligi la revuon kaj la temojn, kiuj estas traktataj en la paperaj eldonoj; ĝi ankaŭ intencas reklami sin por la esperantistaro, kiu ankoraŭ ne konas la periodaĵon.

La retejo jam havas detalajn informojn pri kunlaboro kaj abono.

Poŝtmarkoj

Sr. (kion signifas Sr.?) Pekim T. VAZ el Brazilo sendis al la redakcio du poŝtmarkojn, kiujn li faris omaĝe al revuo Kontakto.

Unu el ili el 2007 prezentas la revuon en la portugala. La alia el 2004 havas saman tekston, sed kun unu foto, kie aperas 7 virinoj! Demandite ĉi-rilate, Pekim diris ke li aldonis foton de siaj nevinoj por "plibeligi" la poŝtmarkon. Pekim, la bildo estas tiom malgranda, ke ni ne povis konfirmi ĉu vi sukcesis. Sendu pli grandan foton de viaj nevinoj al la redakcio. =P



Enketo

La nova retejo de Kontakto starigis enketon por ekscii ĉu jam estas tempo por ŝanĝi la logotipon de Kontakto al iu pli nova. Al la demando "Ĉu nova logotipo por Kontakto?" 50 personoj repondis la enketon kaj el ili:



- 24% respondis ke jes, ĉar la nuna tro malnovas.
- 32% asertis ke tio ne tre gravas
- kaj la plejmulto 44% diris ke ili preferas la nunan.

La sukcesa nuna logotipo de Kontakto eliris el la kraĵono de Francisco VEUTHEY, grafikisto kaj iama redaktoro de Kontakto (1992-1998).

Pri Inicialoj DC versajne plejmulto de la muzikŝatantaj esperantistoj iam aŭdis. Kelkaj eble eĉ ĉeestis unu el liaj koncertoj dum E-aranĝoj, sed la homo malantaŭ la nomo tamen estas iom malmulte konata. La muzikprojekton fondis kaj gvidas unusola homo - la franco loĝanta en Germanio Eric Languillat. Ĵus lanĉinte sian unuan plenesperantan albumon Urbano, Eric parolis kun Kontakto kaj kvankam li ne volis malkaŝi kion signifas "Inicialoj DC", tamen li multe parolis pri diversaj aliaj temoj, kiel la komenco de la projekto kaj la nova albumo. Li ankaŭ respondis ĉu, kiam surpodie, li sentas sin iom sola...sola...



Eric Languillat, la homo malantaŭ Inicialoj DC

Inicialoj DC

DE ROGENER PAVINSKI

Kontakto: Inicialoj DC estas via sola projekto, kial do ne uzi vian veran nomon anstataŭe? Kion signifas Inicialoj DC kaj kiel naskiĝis tiu projekto?

Eric: Komence, mi intencis fondi bandon kun du amikoj, sed unu rapide konfesis ke li ne havos tempon, kaj la alia tiam anoncis ke li preferus fari ion sola... Tiam mi decidis tamen starigi ion. La nomo estis rapide elektita, sen multo da pripensado, kiam mi komencis la projekton. Mian propran nomon mi tiam ne volis uzi ĉar mi ankoraŭ ne decidis ĉu mi volas fari tion sola, aŭ ĉu nur tiel komenci kaj havi pli da anoj poste. Nun mi foje bedaŭras

tion ĉar "Initials DC" aŭ "Inicialoj DC" ne tiom facile prononceblas kaj multaj homoj miskomprenas ĝin kiam ili demandas min pri mia "artista nomo". Tamen nun iom tro malfruas por ŝanĝi tion. Pri la signifo de la nomo... Nu, iom da mistero ne malbonas.

La unua albumo de Inicialoj DC (Popcorn for Diane) aperis en la franca kaj angla, kial vi decidis uzi Esperanton en postaj kanzonoj?

Mi esperantigis en 2000-2001 kaj ne sufiĉe spertis pri E-o kiam tiu unua albumo aperis (2003). Sed poste, ĉar esperanto ja estas parto de mia personeco, igis tute normala

afero por mi uzi tiun lingvon ankaŭ en mia muziko, ekde kiam mi sentis min kapabla fari tion. Krome, mi ne vere aŭdis similan muzikon en Esperantio antaŭe, do mi opiniis ke mi ne malutilus al la Esperanto-kulturo se mi farus tion. Ekster la E-movado, uzi Esperanton ankaŭ igas la projekton iom pli originala (kvankam eble ankaŭ iom stranga, sed tio ne timigas min!).

Ĉu vi havas aliajn muzikajn projektojn krom Inicialoj DC?

Mi nuntempe okupiĝas pri la registrado kaj la aranĝoj de la nova albumo de la kantisto germana Fred Erikson, kaj mi regule registras akustikajn kovraĵojn de famaj kantoj sub la nomo "Platini45". Sed Inicialoj DC restas mia ĉefa projekto.

Kiuj estas viaj muzikaj influoj? Kiajn muzikstilojn kaj artistojn vi plej ŝatas?



Mi ne tre ŝatas etikedojn muzikajn. Por mi ekzistas nur klasika muziko, kaj pop-muziko (kaj eble ĵazo). Kaj mi estas infano de la pop-muziko. Sen-dependaj artistoj ĝenerale pli plaĉas al mi, sed tio ne estas muzikstilo. Mi aŭskultas muzikon la tutan tagon, kaj povas same ŝati melankolian folkan kantaĵon kiel dancigan elektronikan

Drake, Sigur Rós, Ladytron, Curtis Mayfield.

Dum viaj koncertoj kutime videofilmoj estas projekciataj kun ĉiu kanto. Kiacelle? Ĉu por ne senti vin tiom sola sur la podio?

Estas ja parte por ne senti min tiom sola sur la podio! Sed ankaŭ por la publiko estas pli interese. Unue, mi mem ne estas tiom vigla aŭ amuza sursceneje. La videofilmoj aldonas do plian etoson al la okazaĵo. Due, mi foje iom ŝanĝas la miksojn de la kantoj, sed tamen ĉar mi uzas multe

antaŭregistritan muzikon el mia komputilo, ĝenerale la kantoj sonas tre simile KDE kaj koncerte - kaj kompreneble estas pli interese kiam koncertoj kaj KD ne estas ekzakte la

samaj. La videofilmoj do tiel helpas igi la koncertojn vidinda spektaklo. Kaj pro tio mi ankaŭ ne volas enretigi ĉiujn ĉe youtube aŭ simila reta servo. Krome mi foje ankaŭ ŝanĝas la filmojn, por ke ĉiu koncerto estu unika.

Kaj kiel la publiko reagas al viaj koncertoj?

Kiel la publiko reagas estas malfacile diri. Bone mi esperas! Fakte ŝajnas al mi ke homoj estas sufiĉe malviglaj dum miaj koncertoj, kaj mi iam timis ke ili eble enuetas, sed rimarkis poste ke la kialo estas ke ili estis tro kaptitaj de la videofilmoj. Post koncertoj oni ofte parolas al mi pli pri la filmoj ol pri la muziko. Eble tiuj videadoj iom pli (tro!) sukcesas ol mi intencis je la komenco!

Urbano estas via unua tutesperanta albumo. Parolu iom pri ĝi.

La ideo malantaŭ Urbano estas la

“Post koncertoj oni ofte parolas al mi pli pri la filmoj ol pri la muziko”

pecon, se ili estas talente verkitaj laŭ mia gusto... Kelkaj el miaj plej ŝatataj artistoj inkluzivas Brian Wilson, The Smiths, New Order, Belle and Sebastian, Björk, Autour de Lucie, Nick

Recenzo



★★★★

URBANO Inicialoj DC 2010

13 trakoj + mp3 instrumentaj de ĉiuj titoloj
Inicialoj dc/Vinilkosmo

Pli da distro ol ŝvito

Urbano estas la unua tutesperanta albumo de Eric Languillat, franco, solulo en Inicialoj DC. Ĝi estas “kvazaŭ kolekto” de pecoj jam lanĉitaj el antaŭaj albumetoj de Inicialoj DC en aliaj lingvoj. “Kvazaŭ kolekto”, ĉar ĉiuj muzikaĵoj ricevis novajn aranĝojn kaj estas akompanataj de kelkaj tutnovaj pecoj.

Mi konfesas ke mi ne ofte aŭskultadas elektronikan muzikon. Sed ĉu tamen Urbano, la nova tutesperanta albumo de Inicialoj DC povas esti konsiderata kiel nur elektronika muziko? Se vi, kiel mi, elektronikan muzikon konas nur laŭ dancklublaj muzikaĵo, la respondo estas: “Certe ne”.

Ĝi ja enhavas la batojn kutimajn al tia muziko, kvankam ne tre fortajn, sed la gitaroj, akustikaj kaj elektraj, donas koloron kaj iom da vigleco al

la palaj sekaj sonoj de maŝino. La tuta albumo sonigas melodion foje gajan, foje trankvilan sed preskaŭ ĉiam kun ecoj de melankolia tono, tamen la muzikpecoj ne tre diferencas de unu al alia, precipe eble ĉar lia raŭka voĉo kantas ĉion preskaŭ kiel flustro, kiu tamen bone kongruas kun la cetero.

La albumo komenciĝas per beleta infaneca kaj gaja ritmo de Printempo, kies teksto diras: “dank’ al vi mi estas imuna, kontraŭ trist’ kaj kontraŭ hont’.” La dimanĉaj fotoj havas bonan refrenon, sekvate de la plej danciga Furora danc’, certe inspirita de Esperantaj diskotekoj - “ni ŝvitu en diskotek’ universala”.

Pri la stultaj viraj kaj virinaj magazinoj kaj ties temoj parolas Ĉie virinoj. Per marsa voĉo de Martin Wiese komenciĝas Ekstetera dolĉaĵ’ - eble la plej

melankolia. Tatua Papi!’ estis kunverkita de Eric kaj DJ Roger Borges. La kantoj en la mezo de la albumo ne aldonas ion tre novan, tamen ĉe la lasta trako Outrun revenas la bona ritmo-bato melankolia.

Fininte la aŭskultadon vi rimarkos ke “elektronika” ne taŭgas por priskribi la muzikon de Inicialoj DC. Por mi, malfaka pri tia muziko, ĝi estas aparta pop-muziko, sen ŝlagroj, sed mi facile imagas ĝin kiel bona fona muziko por distraj festoj kaj eta dancado.

La KD, krom muzikvideo de la kanto Berlino sen vi entenas ankaŭ ankaŭ MP3-versiojn de la Esperantaj kantoj el la albumoj OK kaj Propaganda, kaj laŭ Vinilkosmo mem ĝi “tiel prezentas planan bildon de la ĝisnuna Esperantomuzika agado de Inicialoj DC.”

Rogener Pavinski



koncertoj en Esperanto-medio, ĉar pro ili mi verkis Esperantajn tekstojn por multaj kantoj kiuj aperis jam en aliaj lingvoj, kaj intertempe mi ankaŭ multfoje ŝanĝis kaj plibonigis la muzikajn partojn, do mi havis amason da E-kanzonoj neeldonitaj - foje laŭ mi pli bonaj ol la eldonitaj versioj - kaj ne certis kiel disponigi ilin.

Siaflanke, Vinilkosmo emis eldoni plenan E-albumon de Inicialoj DC, eble kunigante la E-kantojn de la albumoj OK kaj Propaganda. Anstataŭe, mi proponis plibone registri tiujn menciitajn kantojn kaj tiel eldoni ilin. Fine, oni ankaŭ enmetis la E-o kantojn de OK kaj Propaganda en la KD-n kiel mp3-aldonejoj.

Kiom da kanzonoj estas novaj kaj kiom estas versio de malnovaj muzikaĵoj?

Estas 2 tutnovaj pecoj, 3 el Popcorn for Diane, 2 el 16, 3 el Propaganda, kaj 3 kiuj jam de iom da tempo ekzistas sed neniam aperis sur KD (inkl. Tatua papili'). Mi esperas ke ankaŭ por tiuj kiuj bone konas la antaŭajn albumojn, Urbano estos interesa ĉar mi registris tiujn novajn versiojn same kaj samtempe kiel novajn kantojn, ĉar laŭ mi albumo devas havi harmonian ĝeneralan sonon. Alie estas kompilo, aŭ stranga kunmeto de kantoj, sed ne albumo.



Kiel funkciis la kunlaborado kun aliaj muzikistoj kiel Roĝer Borĝes kaj Martin Wiese por Urbano?

Roĝer iam sendis al mi muzikpecon komence de 2009, kaj demandis min

“...en urboj mi sentas min kiel fiŝo en akvo. Mi estas urbano”

ĉu mi ŝatus fari kantadon. Mi diris ke jes, sed plurfoje sensukcese provis labori pri tiu peco. Melodion kaj kelkajn vortojn mi havis, sed iel ne atingis kontentigan rezulton. Tamen, post jaro (!) mi sukcesis realigi kion mi havis en la kapo, registris la voĉajn partojn kaj sendis la mikson reen al Roĝer. Poste ni iomete preparolis la strukturon de la kanto kaj interkonsentis pri la versio kiun vi konas. Kelkajn semajnojn poste ni renkontiĝis en Madrido kaj kune filmis en la urbo por fari muzikvideon.

Kun Martin estis tre simple, mi nur bezonis ke iu diru kelkajn vortojn, mi petis al lin fari tion kaj bonŝance li konsentis. Ni faris tion interrete dum unu vespero, li sendis al mi kion li registris kaj mi uzis tion en la kanto.

En la titolo kaj kovrilo de via nova albumo, samkiel en viaj muzikvideoj, la urboj ofte ĉeftemas. Ĉu urboj mirigas vin?

Ne aparte mirigas min, sed estas mia medio, kaj en urboj mi sentas min kiel fiŝo en akvo. Mi estas urbano.

Kiuj estas la ideoj malantaŭ viaj muzikvideoj?

Estas por mi tre interesa laboro. Videofilmo povas ekzemple glate akompani kantaĵon, per sama temo aŭ ritmo, sed povas ankaŭ iri kontraŭe kaj surprizi la spektantojn, aŭ proponi tute alian vidpunkton por la tekstoj.

Mi ne provas rakonti historion per la videofilmoj, mi nur iom ludas kun tiuj konceptoj bildaj, kaj celas ke la tuto estu distra kaj mojosa. Kaj vere la intenco estas fari akompanajn filmojn por la koncertoj, ne videoklipojn kiujn oni rigardu hejme, kvankam kelkaj preskaŭ taŭgus tiucele.

Kial vi ĉie reliefigas ke Inicialoj DC lokiĝas en Frankfurto-ĉe-Majno en Germanio? Ĉu laŭ vi la lokiĝo estas tiom grava?

Mi fakte ne konsciis ke mi faras tion... La afero verŝajne estas tiel: mi tute ne ŝatas skribi tekstojn por prezenti min. Mi verŝajne iam skribis ke Inicialoj DC lokiĝas en Frankfurto, kaj poste ĉiam uzis saman teksteton - kaj aliaj homoj ankaŭ plu uzis kaj uzas ĝin! Tial tio ofte estas menciita. Sed al mi la lokiĝo ne estas grava, Inicialoj DC estus tute sama en Moskvo aŭ Amsterdamo (krom eble kelkaj kantoj en la rusa aŭ nederlanda!). ■


www.initialsdc.net

Disponeblas pliaj kantaĵoj, kiuj ne aperis en Urbano, en B-muzikaĵa albumeto nomita urbullo.

@ Youtube



La muzikvideo de la kantaĵo Tatua papili', registrita de Roĝer Borĝes havas ĉ. 1400 spektantojn sed..



plej spektita estas Kurso de Esperanto. Amatora video kun ĉ. 2400 spektantoj.



Pacon per muziko!

Playing for Change (Ludi por ŝanĝi) estas disvastiĝanta usondevena projekto, kiu celas pacemigi la mondon pere de muziko. Ĝia forto estas, ke ĝia agrimedoj jam estas tre pacemiga: la muziko mem. Tiu projekto naskis senprofitan fondaĵon, kiu socie agas en malriĉaj landoj pere de muziko. Kiam oni bone pririgardas la aferon, ŝajnas, ke nenio fuŝiĝas en ĝi: ĉio perfekte akordiĝas: la celoj, la motivoj kaj la rimedoj... krom se oni estas esperantisto!...

GIJOM ARMIDE, FRANCIO

Kie ajn vi estas, restu ĉe mi

Ĉu vi ankoraŭ ne spektis tiun **filmeton** troveblan ĉe Vimeo kaj Youtube, kiu vid-kaj aŭdigas homojn de la tuta mondo kunkantantajn Stand by me (Restu ĉe mi) en la strato? Ne? Do mi priskribu por vi (sen iu ajn objektiveco ĉar tiu filmeto ĉiam ege emocias min!).

La unua afero estas, ke tiuj homoj kunkantas ne kunveninte. Kiel eblas tio? Nu, mi nenion instruos al vi pri la magio de la nuntempa teĥnika aparataro de la homaro. Tamen mi substreku la genion de la skipo, kiu havis tiun belegan ideon kaj tiom belege realigis ĝin: iri ĉien en la mondo, filmi homojn kantantajn sur la strato kaj kunmiksi ĉiujn surbendigaĵojn por elkrei ion novan, kvazaŭ tiuj muzikistoj

renkontiĝintus en registro-studio. Kompreneble, la beleco de la rezulto devenas de tio, ke ili fakte ne renkontiĝis. Ili eĉ ne konas unu la alian. Tamen ili ludas kaj kantas perfekte harmonie. Tio ne devenas de la magio de la teĥniko sed de tiu de la muziko, kiu ne povas pli bone pruvi sian universalecon ol tiel.

Claude Piron diris en Le Défi des langues (La defio de la lingvoj), ke unu kialo, pro kiu homoj kreis tian

lingvo-diversecon, estas, ke ili bezonis barojn. Ili bezonis barojn por protekti sin kontraŭ la malamiko kaj por plifortigi siajn komunumojn. Sed farante tion, ili ne tute apartiĝis. Ĉiu homa komunumo senkomunike disvolvis la saman komunikarton efikan al iu ajn homo sur la Tero. Tio estas muziko. Per muziko, la homaro jam havigis al si universalan lingvaĵon. Kaj estas tente pensi, ke, se muziko trudiĝis

tiel al ĉiuj popoloj de la mondo, kun samaj gramatiko kaj notprovizo, devas esti io, ĉu en la aero, ĉu en la grundo, kio kontaktigas nin ĉiujn, unu kun alia, senzorge pri geologiaj, kulturaj ĉirkaŭoj. Nur muziko kaj ĝia apudiga povo ebligas kanti «Restu ĉe mi» al



homoj plej malproksimaj unu de la alia!

La dua afero estas, ke, kiel dirite, tiuj homoj kantas plej ofte sur la strato aŭ ie ekstere ĉar ili muzikumas pro neceso kaj per simpleco. Ne nepre temas pri profesiaj muzikistoj, kiujn oni petis ludi ekstere, ĉar sunas, do estos pli ĉarme tiel. Temas pri simplaj homoj, por kiuj muziko estas lingvo por komuniki kun la plej proksimaj homoj de sia ĉirkaŭo: la preterpasantoj. Kun tiuj komenciĝas la magia interligado. Kaj ĝin disvastigas Playing for Change (Ludi por ŝanĝi) ĝis tutmonda reto.

Kio estas Playing for Change?


Je la komenco estis nur tiu arta ideo. Sed «arta» ne laŭ la nuntempa modo kiu malriĉigas ĉiujn vortojn, kaj komprenigas arton kiel dekorcelan profesion, politikon kiel praktikadon de la povo, kaj ekologion kiel biologian fakon. Laŭ la nobla, la ĉiama senco, «arta» povas esti samtempe krea, bela, unuiga, riĉiga, vidkapabla kaj eĉ paciga. Konsekvence, tia «arta» projekto, ne povis resti nur afero pri filmetoj ĉe Youtube.

La projekto pli kaj pli ampleksiĝis. Aliĝis al ĝi «steluloj» kiel Manu Chao kaj Bono (la kantisto de la mondfama bando U2, kiu havas Esperantan nomon!). Post iom da tempo eblis organizi koncertojn, kiuj finfine kunigis kelkajn el la disaj muzikistoj. Ĉar oni scias la historion de tiuj homoj, la koncertoj certe havis tre apartan etoson.

Kaj la koncerto naskis fondaĵon, kies celo estas ebligi aŭ faciligi muziklernadon en malriĉaj regionoj de la mondo, por ke ĉiuj homoj povu disvolvi sian muzikkapablon.

La fondaĵo Playing for Change (FPFC), interalie, jam:

- helpe de LEAF International, ebligis ke ruandaj orfoj gastu kaj lernu muzikon en la Intore Culture and Music Center;
- ebligis konstruadon de muzikaj danclernejoj en Tamale, Ganao ununura lernejo de la regiono;



La skipo vojaĝis tra la tuta mondo por registri surstratajn artistojn

- havigis aparataron kaj pagas instruistojn de la Tintale Village Teaching Center en Nepalo;
- kunlaboras kun Lesego Rampolokeng (fama sud-afrika poeto) kaj Bobby Rodwell pri konstruado de la Melho Arts Center en Johanesburgo, Sud-Afriko;
- konstruigis muziklernejon en Gugulethu, Sud-Afriko...

Kaj denove, neniu el tiuj projektoj estas simpla afero pri muzikfarado, sed ĉiu havas civitanan, solidarecan, sociajn celojn ĉirkaŭ muzikarto.

Mi ne konas multajn senprofitajn organizaĵojn kiel FPFC. Ĝi agas por, per kaj pro muziko kaj paco. T.e. muziko kaj paco estas samtempe celoj, komunikperoj kaj motivoj. Tiel, ĝi ne povas erari! Kaj tiel ĝi estas multsenca al mi.

Kio pri Esperanto?

Kiel ĉiam, la esperantistoj havas bonan kialon malĝojiĝi pri Playing for Change. Kiam oni pririgardas la retejon kaj spektas ĉiujn filmetojn, evidentas, ke la projekto naskiĝis en Usono. Nu, ĝi ja devis naskiĝi ie! Sed, jes ja, oni rajtas bedaŭri, ke la muziko estas tre tipe usona (ne ĉiam sed ofte) kaj ĉefe, la tekstoj ne tipas neŭtrale. Oni rajtas bedaŭri, ke Playing for Change ne elektis rimedojn taŭgajn por vera bona mikso de ĉiuj kulturoj. Sed ĉu eblus



fari alie, nuntempe? Ĉu eblus forgesi pri la regado de la angla kaj de la usona kulturo? Se jes, ĉu la projekto havintus la saman sukceson? Ĉu ĝi ne devus almenaŭ eki per la nunaj modoj?

Mi ne respondis tiujn demandojn, sed tamen kun helpo de aliaj esperantistoj deziras iel enigi Esperanton en Playing for Change ĉar mi kredas, ke tio indas. Tio indas, kaj por Esperanto, kaj por la projekto mem, kiu povus disvolviĝi laŭ nova dimensio tute taŭga al ĝia spirito. Fakte, mi simple pensis, ke ni povas imiti la projekton per filmado de kanzonoj kantotaj kaj ludotaj de tutmondaj esperantistaj muzikistoj. Kie ajn vi estas, ĉu vi volas resti ĉe mi? ■

<http://playingforchange.com>

Ce la oficiala retpago de la projekto vi povas koni pli pri la fondaĵo, spekti multajn videojn kaj aceti DVD-jn kaj KD-jn;



JUNECO

Ĉu la plej bona aĝo?

ROBERTO DA SILVA RIBEIRO, BRAZILIO

Kio estas juneco? Juneco malsamas laŭ kulturo, lando kaj epoko. Inter ĉasistoj, viro estas plenkreska, kiam li povas ĉasi sufiĉe por sia familio; inter terkultivistoj, kiam li povas prilabori sian propran bienon. Virinoj, ĉe ili, estas plenkreskaj, kiam ili akiras edzon. En industriaj landoj, riĉaj aŭ ne, plenkreskulo estas homo, viro aŭ virino, kiu akiras stabilajn karieron kaj amvicon. De tio, oni povas kompreni ke junulo en ĉiuj epokoj, kulturoj kaj landoj havas du bazajn problemojn: kiel akiri ekonomian memstarecon kaj kiel akiri partneron.

Kompreneble, dum infanaĝo, aliuloj zorgis pri problemoj de individuo, sekve, tiuj unuaj problemoj, kiujn iu devas solvi per si mem, ŝajnas tro grandaj, ĉar mankas al homo memfido aŭ sperto. Tamen, junulo estas pli libera ol infanoj, pli sana ol maljunuloj, kaj ne havas pezajn ŝarĝojn kiel mezaĝuloj. Pro tio, multaj homoj pensas ke junaĝo estas la plej bona aĝo de la vivo.

Mia persona sperto

Mia juneco en Sudameriko estas simila al tiu de okcidentaj eŭropanoj, kiuj travivis la duan mondmiliton, aŭ de portugaloj, hispanoj kaj grekoj, kiuj vivis en la 1970-aj jaroj, de orientaj eŭropanoj tuj post la fino de komunismo tie, aŭ sudafricanoj kiuj batalis kontraŭ apartismo.



Juneco povas esti tre malfacila periodo por tiuj, kiuj bezonas batali por travivo

Dum mia infaneco en Brazilo, mi travivis tre malbonajn vivkondiĉojn en malriĉega kvartalo, kie ne estis defluisistemo aŭ rubejo. Rubaĵoj kaj uzitaj akvoj estis ĵetataj sur la senasfalta ŝtrataĉo, banditoj vendis narkotaĵojn kaj mortigis homojn. Krom tio, ni travivis ferocan diktaturon, kiu persekutis multajn homojn el mia familio. Tiam, mi okupiĝis pri transvivo. Ĉe mia strataĉo vivis ĉirkaŭ dek knaboj samaĝaj kiel mi, nur 3 el ni nun postvivas. Iuj mortis pro malsanoj, iuj pro kugloj aŭ torturoj.

Mia juneco komenciĝis kiam mi estis 14-jaraĝa, kiam mi provis akiri mian unuan dungon. Tiam, 1982, la brazila diktaturo ekmalfortiĝis, samkiel aliaj diktaturoj de Sudameriko. Post la fino de la diktaturo, dum ĉirkaŭ dudek jaroj, la ekono-

miaj problemoj estis tre gravaj; en 1988 la brazila inflacio estis 82% monate. Post 1990, la inflacio malgrandiĝis, sed la homoj tre malfacile povis dungigi. Preskaŭ ne estis ŝtataj helpoj al la senlaboruloj, malsanuloj kaj maljunuloj.

Krom tio, de sia 14-a ĝis la 16-a jaraĝo, oni devis okupiĝi pri politikaj movadoj, marŝadoj, ribeloj, strikoj, fondo de novaj partioj, sekretaj debatoj, akiro kaj legado de malpermesitaj libroj, milita preparo al ebla revolucio, se necese. Kompreneble, oni havis ankaŭ aliajn komunajn problemojn de junaĝo; oni ofertis narkotaĵojn al ni, estis multaj seksmalsanoj (multaj homoj, kiujn mi konis mortis per aids), ni havis amkonfliktojn (unu el miaj kolegoj sinmortigis pro amaferoj), familiajn problemojn ktp.

Kiam mi estis 17-jara, mi lasis

mian gepatran hejmon por studi en universitato tri mil kilometrojn fore de mia naskiĝurbo. Mia patro sendis al mi ion kiel 50 usonaj dolaroj ĉiun monaton. Tio estis malsufiĉa por deca vivteno, kaj mi transvivis per senpaga supo, kiun la universitato proponis al la malriĉaj studentoj, post kiam ni faris ribelon.

En la universitato, mi partoprenis politikajn debatojn, studentajn ribelojn kaj ekkonis mian ontan edzinon. Ni geedziĝis kiam mi estis 21-jara.

Dum la sekvaj jaroj ni travivis gravan ekonomian krizon. Mi kaj mia edzino loĝis en dometo sen kuranta akvo, deflusistemo aŭ rubkolekto. Ni vivis per nestabilaj dungoj, kaj ofte ni ne manĝis viandon, fromaĝon aŭ ovojn dum monatoj (kompreneble, ni ne estis laŭvolaj veganoj). Finfine, kiam mi estis 28-jara, mi akiris iom stabilan memstaran ekonomian vivon kaj havis nian unuan filinon. Mi pensas ke tiam mia juneco finiĝis.

La plej bona aĝo

Ĉu junaĝo estas la plej bona aĝo? Vere ne! Ĉiuj aĝoj havas siajn problemojn kaj siajn ĝojojn. En ĉiu aĝo eblas esti feliĉa aŭ malfeliĉa. Feliĉa aĝo estas aĝo, en kiu oni vivas en demokratia lando kun stabila ekonomio. Nuntempe mi estas multe pli feliĉa ol dum mia juneco, malgraŭ la malasanoj de mezaĝo. Mia stomako ne plu bone fukcias, miaj fingroj estas malmolaj, miaj ostoj doloras. En mia urbo ankoraŭ ne estas rubejo aŭ deflusistemo. Certe mi ŝatus pli bonan dungon, publikajn omaĝojn, famon ktp. Tamen Brazilo estas libera lando, mi povas akiri librojn, voĉdoni kaj diri kion mi volas, nuntempe Brazilo havas stabilan ekonomion, mi ne plu devas zorgi pri tio kion mi manĝos, aŭ kie mi dormos, la vivo ne estas tiel peza.

Juneco ebligas kelkajn ĝojojn, kiel festojn, amidumadojn kaj vojaĝojn, sed tio ne estas feliĉo. Feliĉo estas longa, sana, libera vivo, nur en la lasta momento homo povos juĝi pri sia propra feliĉo. ■

Mi pasigas mian lastan jaron en la mezlernejo kaj ĝis ĉi tiam ankaŭ mi pensis, ke la vivo de junuloj estas pli-malpli facila. Sed nun...

Mi faros la abituriantan ekzamenon en majo kaj junio, kaj mi eĉ jam nun devas studi multege. Ne pro tio, ke mi antaŭe ne lernis kion oni instruis en la lernejo, sed ĉi tie instruistoj ial konsideras la ekzamenon ege-ege gravega afero, kaj tio multe stresas nin, lernantojn.

La sistemo estas ĉi tie la jena: se vi ricevas sufiĉajn poentojn en la abiturianta ekzameno, vi povos registriĝi en via elektita universitato. Aliakeze eble vi ne povos tion fari. Onidire ĉiuj estos akceptitaj en IU universitato, sed ni certe ne volas iri ien ajn, nur tien, kien ni jam ekde kelka tempo deziras - sed ĉio dependas de la rezulto de tiu unu ekzameno.

Do, tiel kaj la instruistoj kaj la gepatroj diras al ni, ke ni devas atingi bonegajn rezultojn. Mi pensas, ke ĉi tio en tiugrada kvanto estas jam sensenca kaj tro stresa. Kial devas timi ankaŭ tiuj, kiuj ja tralernis siajn 4-6 jarojn en la mezlernejo? Ĉu la situacio ĉie estas tiom timiga?

Bonvolu rakonti, kiel okazas tiuj ekzamenoj en viaj landoj! Ĉu ili ĉie estas tiom streĉaj? Ĉu ankaŭ ĉe vi gravas preskaŭ nur la rezulto de la abiturianta ekzameno?

DITTA BÉKÉSI - HUNGARIO

Mi pensas ke esti juna estas amuze :)

Kiam oni estas maljuna, oni havas pliajn fizikajn dolorojn, oni estas pli laca, kaj oni kutime ne estas tiom bela kiom oni estis dum sia juneco! Se oni ne estas malmatura junulo, oni povas ĝui la bonan sanon kaj belecon de la juneco mi pensas :) Tion instruis al mi mia patrino, ĉar ŝi estas jam iomete maljuna, kaj diras al mi ke mi devas ĝui mian junecon ĉar tre baldaŭ ĝi finiĝos.

KATHARINE BROWSHIRE - USONO

Mi aparte ŝatas esti juna, sed mi ĝuas ĉiun periodon de mia vivo, mi pensas. Juneco varias laŭjare, maturiĝas, estas interese. Ĉiel ajn, mi ŝatus konfesi, ke al mi mia generacio ŝajnas duonmalviva, aŭtomata, laŭfluiranta. Mi ne parolas pri miaj verdaj amikoj, sed pri nia generacio ĝenerale. Ĝi sekvas nur malprofundajn kulturajojn, facilan muzikon, facilegajn komediprogramojn, kaj ĝia nura celo ŝajnas esti mojosaĉa.

Kia ajn diskuto pri sociaj aferoj, pri eblaj agadoj favore al gravaj plibonigoj al nia socio, nur surprizetas kaj paroligas kelkajn sensignifajn jes-jes-konsentojn. Evidente estas interesaj gejunuloj, kiuj tenadas junecon kaj nian generacion mem partete interesa kaj inda je kelke da atento. Kaj tiel pluas ni...

FERNANDO MAIA JR. - BRAZILO




Restu malsata. Restu

TRADUKIS: SANDRO POLLASTRINI, ITALIO

Ĉi tiu estas la teksto de la magistriĝa ceremonio, farita de Steve Jobs, delegita administranto de Apple Computer kaj de Pixar Animation Studios, eldirita la 12an de junio 2005.

Mi tradukis ĉi tiun prelegon, kiun eldiris Steve Jobs. Mi pensas, ke ĝi estas unu el la plej bonaj lecionoj pri vivo, kiun oni povas aŭskulti aŭ legi. Mi donas la tradukon de ĝi al la Esperanta mondo, kiu, danke al siaj frenezaj ideoj, daŭre vivas tre aktive kaj tre amuze.



Apple Inc. estas Usona entrepreno pri teknologio kaj komputiloj kunfondita de Steve Jobs. En 2010 ĝi fariĝis la dua plej granda entrepreno de la mondo.

Estas por mi honoro esti hodiaŭ ĉe via magistriĝa ceremonio en unu el la plej bonaj universitatoj de la tuta Tero. Mi neniam magistriĝis. Se diri la veron, ĉi tiu estas la plej proksima afero al magistriĝo. Hodiaŭ mi volas rakonti al vi tri historiojn el mia vivo. Jen la tuto. Nenio mirinda. Nur tri historioj.

La unua historio estas pri la kunligado de la punktoj

Mi retiriĝis el kolegio Reed post la unuaj ses monatoj, sed mi restis tie kiel enŝoviĝinto, dum ĉirkaŭ pliaj 18 monatoj, antaŭ mi vere retiriĝis. Do, kial mi retiriĝis?

Ĉio komenciĝis antaŭ mia naskiĝo. Mia biologia patrino estis juna, ne edziniĝinta, magistriĝinta studentino, kaj ŝi decidis lasi min por esti adoptita. Ŝi tre forte volis, ke mi estu adoptita de magistroj, tial ĉio estis aranĝita tiel, ke, post mia naskiĝo, mi estu adoptata de advokato kaj lia edzino. Escepte de ilia reripenso: kiam mi estis ĵus naskiĝinta, ili decidis, ke ili reale volas inon. Tiam, miaj gepatroj, kiuj estis en

atendolisto, nokte ricevis vokon, kiu demandis: "Ni havas neantaŭviditan viran infanon; ĉu vi volas lin?" Ili diris: "Kompreneble." Poste, mia biologia patrino malkovris, ke mia patrino neniam magistriĝis kaj mia patro eĉ neniam diplomigis. Ŝi rifuzis subskribi la finajn foliojn de la adopto. Ŝi akceptis nur post kelkaj monatoj, kiam miaj gepatroj promesis, ke iam mi iros al universitato.

Kaj post 17 jaroj, mi vere iris al universitato. Tamen mi naive elektis universita ton, kiu estis pli-malpli same multekosta kiel Stanford, kaj la tutaj ŝparoj de miaj laboristaj gepatroj estis elspezitaj por miaj universitataj kostoj. Post ses monatoj, al mi ne eblis trovi valoron en ĝi. Mi ne havis ideon pri tio, kion mi volas fari kun mia vivo, kaj pri tio kiel la universitato povas helpi min malkovri ĝin. Kaj tie mi estis elspezanta la tutan monon, kiun miaj gepatroj ŝparis dum sia tuta vivo. Do, mi decidis retiriĝi kaj kredi, ke ĉio estos bona. La decido estis tre timiga tiam, sed

reripensante ĝin, ĝi estis unu el la plej bonaj decidoj, kiujn mi iam ajn faris. Kiam mi retiriĝis, mi ĉesis sekvi kursojn, kiuj ne interesis min, kaj mi komencis sekvi nur tiujn, kiuj ŝajnis al mi interesaj.

Ne ĉio estis romantika. Mi ne havis dormoĉambron, do mi dormis sur la planko en la ĉambroj de amikoj, mi revendis kokakolaajn botelojn por la 5 centimoj de garantidepono, per kiuj mi aĉetis manĝaĵon, kaj mi marŝis 7 mejlojn ĉiudimanĉe, por akiri unufoje semajne bonan manĝaĵon ĉe la templo Hare Krishna. Mi amis ĝin. Kaj multon el tio, kion mi hazarde renkontis sekvante miajn scivolemon kaj intuicion, fariĝis nemezureble grava por mi. Permesu al mi doni al vi ekzemplon:

La universitato Reed tiam proponis eble la plej bonan instruadon pri kaligrafio en la lando. Tra la tuta universitato, ĉiu afiŝo, ĉiu etikedo sur ĉiu tirkesto, estis belege skribita mane. Ĉar mi retiriĝis kaj ne devis sekvi la ordinarajn kursojn,

mi decidis sekvi kaligrafian kurson por lerni kiel fari tion. Mi lernis pri la karakteroj serifaj kaj senserifaj, pri variigo de la spaco inter diversaj literkombinaĵoj, pri tio kio igas la tipografion elstara. Tio estis belega, historie kaj arte rafinita, laŭ maniero, kiun la scienco ne povas rikolti, kaj mi trovis ĝin fascina.

Pri nenio el tio mi havis esperon trovi ian praktikan utilon en mia vivo. Tamen, post dek jaroj, kiam ni estis projektantaj la unuan komputilon Macintosh, ĉio malkovriĝis utila por mi. Kaj ni ĝin enirigis tute en Mac. Ĝi estis la unua komputilo kun tre bela tipografio. Se mi neniam estus enŝoviĝinta en tiun unuopan kurson en la universitato, Mac neniam estus havinta la multenombrajn karakterojn aŭ la proporcie interspacigitajn litertipojn. Kaj konsidere ke Vindozo nur kopiis Mac, verŝajne neniu persona komputilo havus ilin. Se mi neniam estus retiriĝinta, mi neniam estus enŝoviĝinta en tiun kaligrafian kurson, kaj la personaj komputiloj povus ne havi la mirindan tipografion, kiun ili havas. Kompreneble, maleblis la kunligado de la punktoj, antaŭrigarde kiam mi estis ĉe la universitato. Sed ĝi estis tre, tre klara, kiam mi rerigardis ĉion post dek jaroj.

Denove, vi ne povas kunligi la punktojn antaŭrigardante; vi povas kunligi ilin nur postrigardante. Tial, vi devas kredi, ke la punktoj iel kunligiĝos en via estonteco. Vi devas kredi ion - vian ventron, destinon, vivon, karmon, ion ajn. Tiu ĉi metodo neniam lasis min malbonsenta, kaj ĝi estis la plej granda elemento, kiu plej gravis en mia vivo.

Mia dua historio estas pri amo kaj perdo

Mi estis bonŝanca - mi trovis tion, kion mi ŝatis fari frue en mia vivo. Woz kaj mi fondis Apple en mia gepatra garaĝo, kiam mi estis 20-jara. Ni intense laboris, kaj en 10 jaroj Apple kreskis ekde ni du en garaĝo al 2-miliarddolaro entrepreno kun pli ol 4000 dungitoj. Ni ĵus eldonis nian pli bonan kreaĵon - Macintosh - antaŭ jaro, kaj mi ĵus fariĝis 30-jara. Kaj tiam mi estis maldungita. Kiel vi povas esti maldungita de entrepreno,




kiun vi mem kreis? Nu, kiam Apple kreskis, ni dungis iun, kiu ŝajnis al mi talenta por estri la entreprenon kun mi, kaj dum la unua jaro ĉio bonis. Sed poste niaj vidpunktoj pri la estonteco komencis disiĝi kaj fine ni atingis malkonsenton. Kiam tio okazis, nia administra konsilio subtenis lin. Tial, je miaj 30a jaroj, mi estis fortranĉita. Kaj tre publike fortranĉita. Tio, kio estis la centro de mia tuta plenkreska vivo, foriĝis, kaj mi estis elfalinta.

Mi reale ne sciis kion fari dum kelkaj postaj monatoj. Mi sentis, ke mi seniluziigis la antaŭan generacion de entreprenistoj - ke mi perdis la torĉon, kiel ĝi estis donita al mi. Mi renkontis David Packard kaj Bob Noyce, kaj mi provis pardonpeti ke mi ruinigis ĉion tiagrade. Mi estis tre publika fiasko, kaj mi eĉ pensis foriri el la Silikona Valo.

Tamen io komencis kreski en mia mensio - mi ankoraŭ amision, kion mi faris. La okazaĵoj ĉe Apple ne ŝanĝis tion ĉe iomete. Mi estis forĵetita, sed mi ankoraŭ estis enamiĝinta al tio. Tial mi decidis rekomenci denove.

Tiam mi ne vidis ĝin, sed mi malkovris, ke la maldungo de Apple estis la plej bona afero, kiu povis okazi al mi. La pezeco de la sukceso estis anstataŭita de la malpezeco esti denove





Apple Macintosh Classic II, lanĉita en 1991

novulo,
malpli certa pri ĉio.
Tio permesis al mi eniri unu el la plej kreemaj periodoj de mia vivo.

Dum la sekvaj kvin jaroj, mi kreis entreprenon, kiu nomiĝis NeXT, kaj alian entreprenon, kiu nomiĝis Pixar, kaj mi enamiĝis al mirinda virino, kiu iĝis poste mia edzino. Pixar kreis monde la unuan komputilo-animitan filmon, Toy Story, kaj estas la plej sukcesa firmao pri komputilo-animacio tutmonde. Per rimarkinda turno de la eventoj, Apple akiris NeXT, mi reiris al Apple, kaj la teknologio, kiun ni evoluigis

ĉe NeXT, estas la kerno de la aktuala renaskiĝo de Apple. Kaj Laurene kaj mi kune havas mirindan familion.

Mi estas preskaŭ certa, ke nenio el tio estus okazinta, se mi ne estus maldungita de Apple. Estis medikamento kun abomena gusto, sed mi opinias, ke la paciento bezonis ĝin. Kelkfoje la vivo frapas vin sur la kapo per briko. Ne perdu fidon. Mi certas, ke la sola afero, kiu plutenis min moviĝanta, estis, ke mi amiston, kion mi faris. Vi devas trovi tion, kion vi amas. Kaj tio veras pri via laboro, kiel pri via amo. Via laboro plenigos la plejparton de via vivo, kaj la sola maniero, por esti vere kontenta, estas fari tion, kion vi opinias grandioza laboro. Kaj la sola maniero por fari grandiozan laboron estas ami tion, kion vi faras. Se vi ankoraŭ ne trovis ĝin, daŭrigu la serĉadon. Ne haltu. Kiel kun ĉiuj koraj aferoj, vi scios kiam vi trovis ĝin. Kaj, kiel ĉiu valoro rilato, ju pli pasas la jaroj, des pli ĝi boniĝas. Do, daŭrigu la serĉadon, ĝis vi trovos ĝin. Ne haltu.

Mia tria historio estas pri morto

Kiam mi estis 17-jara, mi legis citaĵon, kiu asertis la jenan: "Se vi vivas ĉiun tagon, kvazaŭ ĝi estas la lasta, iun tagon vi sendube estos ĝusta." Ĝi impresis min, kaj ekde tiam, dum la lastaj 33 jaroj, mi rigardis la spegulon ĉiutage, demandante min mem: "Se hodiaŭ estus la lasta tago de mia vivo, ĉu mi volus fari tion, kion mi devos fari hodiaŭ?" Kaj kiam la respondo estas "Ne" dum tro multaj sinsekvaj tagoj, mi scias, ke mi bezonas ŝanĝi ion.

Memori, ke mi frue estos mortinta, estas la plej grava ilo, kiun mi iam renkontis por helpi min fari la grandajn elektojn en mia vivo. Konsidere, ke preskaŭ ĉion - ĉiuj eksteraj atendoj, ĉiu orgojlo, ĉiuj timoj pro embaraso aŭ fiasko - tiuj ĉi aferoj nur foriĝas fronte al la morto, lasante nur tion, kio vere gravas. Memori, ke vi estas mortonta, estas la plej bona metodo, kiun mi konas, por eviti la kaptilon, kiu kredigas vin, ke vi havas ion, kion vi povas perdi. Vi jam estas nudaj. Ne ekzistas rezono, pro kiu vi ne devas sekvi vian koron.

Kiu estas Steve Jobs?


Steven Paul Jobs estas konsiderata kiel pioniro de la komputila industrio. Post kiam li ĉe Xerox en la Palo Alto Research Center (PARC) vidis demonstracion de grafika interfacio kun fenestro kaj muso, li ankaŭ uzis tian ĉi interfacon en la Apple Lisa, kiu estis ege multekosta kaj vendiĝis tre malbone. Rapide sekvis la multe pli sukcesa Macintosh. Jobs en 1985 forlasis la firmaon, post kiam la estrara konsilio malpermesis al li havi ĉefan funkcion ene de la firmao. Tiam Jobs kreis la firmaon NeXT Computer.

Jobs dum la somero de 1997 iĝis tamen la estro de Apple. Li draste ŝanĝis la firmaon, i.a. maldungante

plurajn personojn, enkondukante novajn produktojn kaj malenkondukante certajn aliajn kiel la Apple Newton. Tre gravis ankaŭ lia influo por la enkonduko de Mac OS X, la nova operaciuma sistemo kiu baziĝas sur sistemo kiun Jobs ellaboris ĉe NeXT Computer.

Steve Jobs estas konata pro lia propra gusto kaj detalemo. Li volas zorgi pri tio ke ĉiuj detaloj enordiĝu. Krom estro de Apple, li ankaŭ estis estro de Pixar. Tiun ĉi firmaon li vendis al la Walt Disney Company, en kiu li iĝis tiel la plej grava privata akciulo.

El Vikipedio



Antaŭ ĉirkaŭ unu jaro, la kuracistoj trovis en mi kanceron. Mi havis skanon je la 7:30 matene, kaj ĝi klare montris tumoron ĉe mia pankreato. Mi eĉ ne sciis, kio estas pankreato. La kuracistoj diris al mi, ke tiu estis preskaŭ sendube speco de kancero, kiu nekuraceblas, kaj ke mi devas atendi vivon ne pli longan ol tri/ses monatojn. Mia kuracisto konsilis al mi iri hejmen kaj reordigi miajn aferojn, kio estas la kuracista kodo por "pretigu vin por la morto." Tio signifas, klopodu diri al viaj idoj ĉion, kion vi estus dironta dum la sekvaj 10 jaroj, en nur malmultaj monatoj. Tio signifas certiĝi, ke ĉio estos bona tiel, ke ĉio estos plejeble simpla por via familio. Tio signifas diri viajn adiaŭojn.

Mi vivis ĉiun tagon kun tiu diagnozo. Pli malfrue, tiun vesperon, mi submetis min al biopsio, kaj oni enirigis endoskupon en mian gorĝon, tra mia stomako kaj miaj intestoj, metis nadlon en mian pankreaton kaj akiris kelkajn ĉelojn el la tumor. Mi estis anestezita, sed mia edzino, kiu estis tie, rakontis al mi, ke kiam ili vidis la ĉelojn per la mikroskopo, la kuracistoj ekkriis, ĉar temis pri tre malofta speco de pankreato tumor, kiu estas kuracebla per kirurgio. Mi submetiĝis al kirurgia interveno kaj mi nun bonfartas.

Ĉi tiu estis travivaĵo plej proksima al la morto, kiun mi iam spertis, kaj mi esperas, ke ĝi estu la plej proksima dum la sekvaj jardekoj. Travivinte tion, mi nun povas diri tion ĉi al vi kun iom pli da certeco, ol kiam la morto estis nur utila sed tute intelekta koncepto:

Neniu volas morti. Eĉ la personoj, kiuj volas iri al paradizo, ne volas morti por atingi ĝin. Kaj, malgraŭ ĉio, morto estas la finpunkto, kiun ni ĉiuj devas alfronti. Neniu iam fuĝis el ĝi. Kaj tio estas kiel devas esti, ĉar la Morto verŝajne estas la plej bona elpensado de la Vivo. Ĝi estas la Vivoŝanĝa aganto. Ĝi forigas la malnovon, liberigante spacon por la novo. Precize nun, la novo estas vi, sed iun tagon, ne tre malfrue ekde nun, vi grade iĝos la malnovo kaj vi estos forigitaj. Mi bedaŭras esti tiel drama, sed tio estas tre vera.

Via tempo estas limigita, tial ne forĵetu ĝin, vivante la vivon de aliulo. Ne estu kaptitaj de la dogmoj - kio estas vivi kun la rezultoj de aliula pensado. Ne lasu, ke la bruo de aliulaj opinioj sufoku vian enan voĉon. Kaj plej grave, havu la kuraĝon por sekvi viajn koron kaj intuicion. Ili iel jam scias tion, kio vi reale volas iĝi. Ĉio alia estas duagrada.

Kiam mi estis juna, aperis mirinda eldonaĵo titolita La katalogo de la tuta Tero ("The Whole Earth Catalog"), kiu estis unu el la biblioj de mia generacio. Ĝi estis kreita de ulo nomita Stewart Brand, ne for de ĉi tie en la parko Menlo, kaj li naskis ĝin per sia poezia tuŝo. Tio estis dum la 60aj jaroj, antaŭ la personaj komputiloj kaj la perkomputila eldonado, tial tio estis farita tute per skribmaŝinoj, tondiloj kaj polaroidoj. Ĝi estis speco de Google en papera formo, antaŭ 35 jaroj: ĝi estis ideala, kaj superplena de inteligentaj iloj kaj grandegaj nocioj.

Stewart kaj lia teamo eldonis plurfoje La katalogo de la tuta Tero, kaj tiam, kiam ĝi finis sian vojon, ili eldonis la lastan numeron. Estis dum la mezaj 70aj, kaj mi estis viaĝa. Sur la malantaŭa kovrilo de la lasta numero estis bildo pri frua mateno de kampara strato, la speco kie vi povus trovi vin mem petveturanta, se vi estus tiel aventurema. Sub ĝi estis la vortoj: "Restu malsata. Restu naiva." Ĝi estis ilia adiaŭa mesaĝo. Restu malsata. Restu naiva. Kaj mi ĉiam volis tion por mi mem. Kaj nun, kiam vi magistriĝos por starti denove, mi volas tion por vi.

Restu malsata. Restu naiva.
Multajn dankojn al vi. ■

Maĉupikĉuo

Vojaĝo al la perdita urbo

ROMULO FELICIO, BRAZILO

Maĉupikĉuo [hisp. Machu Picchu] en Peruo estas magia loko por mi jam de miaj adoleskaj jaroj. Tiam mi ne havis multajn informojn pri la sankta urbo de la inkaoj kaj ĉio, kion mi sciis, estis ke la loko estas mistika, energiplena kaj ege bela kun siaj strukturoj el skulptitaj rokoj. Ĉiajn rakontojn, kiujn mi aŭdis, venis de aventuremaj junuloj, kiuj kun dorsosakoj kaj

malmulte da mono enpoŝe sukcesis ekkoni la magion de la urbo. Pro simila subita intereso, mi komencis vojaĝi tra Sudameriko. Mi vizitis Bolivion kaj Peruon en 2005, 2007 kaj 2010. Kio instigis min fari la saman vojaĝon plurfoje (laŭ malsamaj vojoj), estis sendube la magio kaj beleco de Maĉupikĉuo.

El Brazilo al Peruo

Mi loĝas en la sudokcidenta Brazilo. De mia urbo ĝis Kusko en Peruo (la plej proksima urbo de Maĉupikĉuo) oni povas skizi rektan linion, kiu trapasas la tutan Bolivion. La unua eksterlanda urbo, kiu ĉiam enestas la vojaĝplanojn, estas Sankta Kruco de

la Montaro (hispane: Santa Cruz de la Sierra) en Bolivio, ne pro tio ke ĝi estas interesege, sed simple ĉar ĝi estas deirpunkto por tiuj, kiuj trapasas la landlimon Brazilo/Bolivio per trajno.

De Sankta Kruco de la Montaro, mi iris ĝis La-Pazo (hisp. La Paz), kiu situas 3 660 m je alteco. La urbo estas miksaĵo de urba kaoso kun nekredblaj naturbelajoj. Ĉar ĝi estas la plej loĝata urbo de la lando kaj troviĝas en profunda valo, ĉirkaŭata de altaj montoj, kiuj apartenas al la montarĉeno de Andoj, la domoj de La Paz prenas la formojn de la montoj per longa etendiĝo kaj la tuta urbo estas ĉirkaŭata



Komenco de la Inkaa pado ĝis Maĉup ikĉuo






Glaĉeroj de "Salcantay"



Verda lago kaj dezerto de Salvador Dali en sudorienta Bolivio



La Pazo, je 3660m



Skipo de la "Salcantay" pado



Flosantaj insuloj de Uros sur la Titikako



Salejo de Ujuni

de belegaj montoj kun glaĉeroj. Deflankigante de la celo de la vojaĝplano, mi vizitis nemaltrafandadan lokon en la suda Bolivio: La salejon de Ujuni [hisp. Salar de Uyuni] kaj ĝiajn parkojn. La salejo de Ujuni estas la plej granda saldezerto de la mondo. La ĉefaj turismaj lokoj estas la salhotelo (neaktiva) kaj

la insulo "Pescado" [Fiŝkapto], kun siaj rifoj kaj kaktoj, kiuj povas atingi ĝis 10 metrojn. En pluvsezono la salejon kovras akvo, kio igas ĝin grandega lago, kun averaĝa profundeeco de ĉirkaŭ 30 cm. Ĝi similas grandegan spegulon, kie ĉe la horizonto miksiĝas la ĉielo kaj tero. El Ujuni al Ĉilio oni trairas la tutan



Insulo de la "Pescado", en la salejo de Ujuni

dezerton kun ĝiaj ekologiaj parkoj kaj koloraj lagoj. Ni revenu al la ĉefa vojo al Maĉupikĉuo. De La-Pazo mi daŭrigis al Peruo laŭronde de la Lago Titikako [hisp. Titicaca]. Titikako estas la plej alta lago komerce navigata. Grandega estis la graveco de la lago en la inkaa kulturo, ĉar laŭ la legendo de Andoj, en ĝia akvo naskiĝis la inkaa civilizacio.

La plej interesa afero pri la lago estas la popolo Uros, kiu loĝas sur insuloj artefaritaj per kunligo de "totora", kiu estas flosanta planto de la regiono. Pluteni la insulojn flosantaj estas malfacila kaj ĉiutaga laboro.

Transpasante la landlimon al Peruo, mi atingis Kuskon, gravan urbon por la tuta Sankta Valo de la inkaoj. Kusko estis la ĉefurbo de la Inkaa Imperio, tial ĝi posedas multajn konstru-restaĵojn ĉirkaŭe kaj plurajn turismajn lokojn.

Maĉupikĉuo

El Kusko, eblas atingi Maĉupikĉuon per trajno aŭ piede per la padoj. Unu el la padvojoj plej serĉataj de la turistoj estas la fama inkaa pado, kies vojo estas tute konstruita el ŝtonoj. Ĉar mi

iris tri fojojn, mi ĝuis ĉiujn eblojn; per kvar-taga piedirado tra la inkaa pado, per kvin-taga piedirado tra la "Salcantay"-pado [Salkantej], kiu ĉirkaŭiras la monton "Salcantay", kaj per trajno, vojaĝo kiu daŭras nur 4 horojn. Ĉiuj fojoj estis tre magiaj.

Maĉupikĉuo, ankaŭ konata kiel la "perdita inkaa urbo", estas urbo, kiu troviĝas ĉe la pinto de monto. La loko estas unu el la plej grandaj simboloj de la Inkaa Imperio. Ĝi estis malfrue malkovrita en 1911 kaj rekonstruita. Maĉupikĉuo estas konsiderata monda heredaĵo de Unesco kaj estas unu el la 7 mondaj mirindaĵoj.

Vojaĝi al Maĉupikĉuo ĉiam por mi estis momento de interna malkovro. Ĉiun fojon mi sentis min malsame kaj mi ne scias per kia influo la loko enŝorĉas min, sed ĉe tri malsamaj okazoj, en la perdita urbo de la inkaoj, mi ĉiam trovis min mem. ■



*La montoj etendiĝas ĉielen ekde la profundegaĵoj de la valoj,
la fontanoj ŝprucas ekde la fundo de la tero, kaj la origino de ĉi
tiu rakonto perdiĝas en la nokto de la tempoj.*

“Unu metio pli valoras ol mil trezoroj”

Tradicia armena rakonto

Tradukis: ANDY HERNÁNDEZ MARTÍNEZ, KUBO/HISPANIO

Iam ekzistis armena reĝo, tre riĉa kaj maljuna, kies sola filo amegis kamparaninon. La princo fideme rakontis tion al sia plej intima amiko, kiu rakontis tion al siaj amikoj, kaj tiuj kuris por diskonigi la novaĵon...

Fine, la tuta lando informiĝis pri la afero.

La kamparanoj aprobis la elekton de la princo, ĉar ili esperis ke reĝino el inter ili multe pli bone aŭskultos iliajn problemojn. Tute male, la nobeloj sentis sin irititaj kaj ofenditaj eksciinte ke la princo ne elektis unu el iliaj inoj. La burĝoj mokis, diskurigis la klaĉon ke Lia Moŝto devus estis freneza ĉar li preferis kamparaninon anstataŭ riĉa heredantino. Preskaŭ ĉiuj estis konvinkitaj ke la reĝo neniam ja konsentus tian geedziĝon.

Sed tio kion neniu imagis, estis ke la kamparanino neis edziniĝi al la princo!

La maljuna reĝo estis tre saĝa kaj super ĉio li deziris la feliĉon de sia filo, li iris al la vilaĝo kie loĝis la juna kamparanino por konvinki ŝin, ĉar en tiuj antikvaj tempoj, reĝoj kaj subuloj renkontiĝis kaj tute normale kaj neformale parolis. Anahit, kiel nomiĝis la knabino, estis bela, saĝa kaj honesta.

-Kial vi ne volas edziĝi al mia filo? - demandis la maljuna reĝo. Li estas belaspekta, saĝa kaj honesta. Krome, li estas princo, kaj iam li postsekvos min sur la trono. Kion pli vi povas peti?


- Mi petas ke li lernu metion - respondis la junulino.


- Sed li estas princo! - surprizite objetis la reĝo.
- Eĉ princo iam povus bezoni metion.
- Sed kiam li estos mastro kaj sinjoro de ĉi tiu lando, ĉiuj estos je lia servo.

- Tio estas vero - koncedis Anahit, - sed, kiu povas garantii la estontecon? La hodiaŭa mastro kaj sinjoro eble devus servi morgaŭ. Dum li ne lernos metion, mi ne edziĝos al li. Antaŭ la decidemo de Anahit kaj de la princo mem, kiu konsideris ke ŝi pravus postuli metion al li, la maljuna reĝo cedis.

Kaj la princo, pro amo al Anahit, lernis la tapiŝ-arton. Dum la tago, li okupiĝis pri kutimaj princaj respondecoj kaj nokte li lernis kun metiisto de la vilaĝo de Anahit, pikante siajn nespertajn fingrojn per la akraj pintoj de la teksiloj. Sidante ĉe la teksomaŝino, li sekvis la konsilojn de la mastro samkiel faris aliaj lernantoj, ofte pli junaj ol li, kiuj tute ne sciis, kiu vere estas li. Dum li laboris, li aŭskultis ilin paroli inter si kun tuta libero. Ili plendis pro la senditoj de la reĝo, kiuj trouzis sian povon kolektante pli da impostoj ol tion kion la leĝo postulis, aŭ pri la senskrupulaj altranguloj kiuj sufokis la kamparanojn per tributoj kaj pagendaj servoj... Li ankaŭ aŭdis ke ili kompatas malriĉan familiestrinon kies edzo ĵus mortis, kaj ke ŝi sola devas nutri siajn kvar idojn.


Post kelkaj semajnoj, la vilaĝanoj rimarkis ke iliaj deziroj estas plenumitaj sen la bezono eldiri ilin al iu ajn: la malbona juĝisto estis anstataŭigita per honesta juĝisto, la vidvino ricevis la pension





de la reĝo mem por digne vivteni siajn filojn...
Kaj la rabistoj pro timo estis malkovritaj kaj
ne plu rabis...


Finfine, iam, la princo ellernis ĉion. Mik-
sante orajn kaj arĝentajn fadenojn kun la lano kaj kun
plurkoloraj silkaĵoj kiujn li nodis en la vefto, li faris
malgrandan tapiŝon, tute ornamitan per drakoj, fiŝoj kaj
birdoj, kaj li donacis ĝin al la juna kamparanino.



- Nun mi pretas kunigi mian sorton al la via
- ŝi diris, akceptante por la unua fojo donacon
de la princo. Vi demonstris al mi ke via amo
estas sincera kaj ke ĝi ne forblovas je la unuaj
malfacilaĵoj. Por celebri la geedziĝon estis orga-
nizitaj grandaj festenoj en la tuta Armenio. Dum
sep tagoj kaj sep noktoj, ĉiuj estis invititaj manĝi kaj
trinki je la sano de la novgeedzoj. La tuta reĝlando estis
tre kontenta, sed la plej feliĉaj estis la kamparanoj: ili
sentis sin tre fieraj pro sia princo, kiu lerninte metion,
egaliĝis al ĉiuj siaj subuloj, kaj ĉio pro amo al la
edzino. Ili ankaŭ sciis ke tiu kiu devis labori per siaj
manoj mem, respektas la laboron de la aliuloj.

Pasis la jaroj, la princo fariĝis reĝo...

Iam, la reĝo volis trairi la landon por esti certa ke liaj
subuloj estas kontentaj je li. Li adiaŭis la reĝinon, kaj tre
simple vestita, kun la celo esti nekonata de ĉiuj, li foriris
por kvardek tagoj tra la tuta lando. Li vizitis la bazarojn,
gastejojn kaj publikajn placojn por aŭskulti la voĉon de la
popolo kaj ĝiajn bezonojn. Li vidis ĉion, li komprenis ĉion:
Liaj ministroj aplikis la leĝojn por sia profito kaj la konsi-
listoj kaŝis ĉion kio malbone okazis en la reĝlando...




Li promesis al si mem, ekde nun pli proksime kon-
trolli la impost-kolektistojn, la juĝistojn kiuj
verdiktis je lia nomo kaj ĉiujn ŝtatlaboristojn
kun rilatoj al la palaco, kiuj ne ĉiam juste
laboris.

Je la reveno, li haltis en gastejo, kie la reĝo
decidis tranokti. Li ĵus enlitiĝis kiam ŝtelistoj
eniris en lian dormoĉambron. Kaj celumante la kolon
per akra ponardo, unu el la ŝtelistoj ekkriis:

- Ne moviĝu, ne krii, aŭ vi estos tuj mortigita! Donu
al mi vian sakon!

La princo restis tre surprizita, konstatante ke en
tiu bela lando, kiun li tre amegis kaj en tiu lando kie
li faris multajn reformojn por certigi la bonstaton de
ĉiuj, ankoraŭ restas homoj pretaj mortigi pro nur kel-
kaj moneroj. Li pensis lukti, sed li troviĝis sola kaj sen
armilo antaŭ senskrupulaj malbonfaruloj.
Tiam li proponis la jenon:




- Mia sako ne havas riĉaĵon, sed, bon-
volu ne mortigi min! Mi estos pli utila viva
ol morta: Mi scipovas fari belegajn tapiŝojn
per kiuj vi povus havi multe da mono.

La banditoj estis facile konvinkitaj kaj
donis al la princo la tutan necesan mate-

rialon por praktiki
sian metion.

Mallibera en subtera
etaĝo, la princo laboris
dum naŭ semajnoj, tage kaj
nokte, en la farado de la tapiŝo, kun
bek-arĝentaj birdoj enplektitaj kun
fiŝoj el oraj skvamoj kaj drakoj el
fajrlangoj.

Vidinte la tapiŝon, la banditoj ĝojis
pri tio ke ili ne mortigis la malliberi-
giton, kaj sekvante lian konsilon, ili
decidis prezenti ĝin en la palaco, kie
sendube la reĝo donus al ili multe da
mono.



La servistoj de la palaco in-
formis la malbonfarulojn ke la
reĝo forestas kaj ke la reĝino estas tre
zorgoplena pri aliaj aferoj kaj ke eble
ŝi ne interesiĝus pri tapiŝoj: ŝi nek
manĝas nek dormas, ŝi nur ploras
kaj preĝas. Facile kompreneblas kial la
reĝino estis malĝoja: la foresto de la reĝo
estis multe pli longa ol la kvardek tagojn kaj
ŝi ne ricevis ian novaĵon pri li.

Sed la banditoj insistis, kaj la servistoj
pli laŭte parolis... Finfine estis tiom da
tumulto ke la reĝino volis informiĝi pri la
okazaĵo. Kiam ŝi vidis la tapiŝon, ŝi tuj rekonis
la labormanieron de la manfaristoj de
ŝia vilaĝo. Kaj, kun emocio, postulis vidi
ĝin de proksime. Tiam, la birdoj kaj fiŝoj
aperis plenŝarĝitaj de signifoj, ĉar ĉiu
desegnaĵo estis unu litero de la alfabeto,
kaj ĉiuj kune formis la sekvan mesaĝon:
"Mi estas malliberigita de ĉi tiuj banditoj". Nun
mi lasas ke vi mem divenu kio okazis poste: Nur
sufiĉas diri ke tiuj homoj estis devigitaj konfesi siajn
malbonfaraĵojn.

La reĝo, finfine liberigita, ne trovis vortojn por danki sian
edzinon, kiu kun granda saĝo devigis lin lerni metion.

Ekde tiam la armenaj lumigantoj* uzas birdoformajn
literojn por ornamati siajn plej valorajn manskribaĵojn.

El la ĉielo falis tri pomoj: unu estas por tiu kiu
rakontas; alia por tiu kiu skribas; kaj la tria, por
tiu kiu legas. Bonan apetiton al ĉiuj!***■

*Lumiganto: Armenoj kiuj desegnis manskribaĵojn kaj librojn dum
Mezepoko per koloraj bildoj.

**Tradicia formulo aperanta en la fino de armenaj rakontoj.



Intermonda invado

THIERRY SALOMON, HUNGARIO

Mi ankoraŭ memoras ĉion, kvazaŭ okazintus nur antaŭhieraaŭ. Flugantaj ŝipoj aperis ĉe la rando de la ĉielo. Jam pli frue kelkaj ekvidis tiajn veturilojn proksime al nia Tero, sed oni ne kredis ilin. Oni pensis, ke ili estas frenezaj aŭ, ke ili volas nur alvoki la atenton pri si. Alia teorio asertis, ke la viditaj “aĵoj” estas nur novtipaj veturiloj elpensitaj de nia militistaro. Sed ĉi-foje multaj vidis tiun areton da veturiloj. Ili ŝvebis tute silente pere de nekonata tekniko.

El unu el la grandaj aĵoj eliris eta kaj per tiu ili alteriĝis. Nia registaro decidis sendi diplomatojn sed ankaŭ soldatojn, ĉar ne eblis scii ĉu temas pri amikaj aŭ malamikaj estaĵoj. Niaj diplomatoj alproksimiĝis al la stranghaŭtaj uloj. Sed ili ne sukcesis komunikiĝi kun la alteriĝintoj. Nur per gestoj. Ĉar la sonoj, kiujn tiuj eligis estis nekompreneblaj. Iliaj vizaĝoj estis timigaj kaj ili havis pintan kapon. Neniu poste memoris kiel tio okazis, sed la aspekto de la estaĵoj timigis nian loĝantaron.

Aliflanke eble ankaŭ ili ektimis nin ĉar pli kaj pli granda scivolema tumulto venis al la loko de la alteriĝo. Ĉiukaze ial oni ekbatalis kaj tio okazis antaŭ ol nia registarestro havis tempon alveni. Aŭdinte pri la ek-militado li ordonis, ke pliaj soldatoj iru tien. Sed niaj plej bonaj soldatoj eĉ per niaj plej modernaj armiloj povis fari nenion kontraŭ la aliuloj. Ĉar tiuj surhavis brilajn skafandrojn, kiuj protektis ilin. Ili povis de malproksime mortigi iun ajn. Dum la lastaj horoj de la batalo ili venigis grandegajn monstrojn helpe de kiuj ili pli rapide povis dispecigi nian armeon. Post tiu unua batalo sekvis pliaj, kaj ene de kelkaj monatoj la estaĵoj regis super la plej granda parto de nia Tero. Ni fariĝis sklavoĵoj kaj devis laboregi en minejoj.

La eksteruloj volis nur ekspluati nian Teron kaj sendi ĝiajn riĉaĵojn al sia mondo.

Tiel rakontis la maljuna sudamerika indiĝeno Atacahú pri la alveno de la hispanaj konkerantoj en sian vilaĝon en la jaro 1499. ■



Jorge Luis Borges

Jorge Luis Borges donas al ni, pere de la perfekteco de sia lingvoesprimo, la erudicio de siaj konoj, la universaleco de siaj ideoj, la unikeco de siaj fikcioj kaj la beleco de sia poezio, verkaron kiu honoras la hispanan lingvon kaj la universalan spiriton.

Li naskiĝis en Bonaero la 24-an de aŭgusto 1899. Per influo de la patra avino, kiu estis anglino, li alfabetiĝis paralele kun la hispana ankaŭ en la angla lingvo, atingante plenan posedon de ambaŭ idiomoj. En 1914 li kune kun la familio forvojaĝis al Eŭropo ekloĝante en Ĝenevo, kie li trapasis meznivelan edukadon. En 1919 li transloĝiĝis al Hispanujo, kontaktante la literaturan movadon de tiu lando, partoprenante ĉefe en la avangarda movado Ultraismo. En li 1921 revenis al Bonaero, kie li intense partoprenis tre aktive en la bolanta urba beletra agado. En 1923 (li estis tiam 33-jara) estis publikigita lia unua poemo-libro, *Fervor de Buenos Aires* (Fervoro de Bonaero).

De tiam ekmalsaniĝis al li la okuloj, li submetiĝas al sinsekvaj operacioj de katarakto, kun rezulto de preskaŭ kompleta blindiĝo en 1955. Iam poste li aludis al sia blindiĝo kiel "lanta sunsubiro kiu daŭras jam de pli ol duonjarcento".

De la apero de lia unua libro ĝis la publikigo de liaj *Kompletaj verkoj* (1974) pasis kvindek jaroj da fekunda literatura verkado, en kiu Borges superis sian malsanon skribante aŭ diktante librojn de poemoj, rakontoj kaj eseoj nuntempe admirataj en la tuta mondo. Li ricevis elstarajn laŭdojn de diversaj eksterlandaj universitatoj kaj registaroj kaj multenombrajn premiojn, inter ili Cervantes en 1980. Lia verko estas tradukita en pli ol dudek kvin lingvojn kaj esplorita de kino kaj televido. Antaŭparoloj, krestomatiaj, tradukoj, kursoj kaj konferencoj elmontris la senlacan

rafinitecon de tiu granda verkisto, kiu revoluciis la prozon en la hispana lingvo, kio estas agnoskata senescepte de liaj samtempuloj. Li forpasis en Ĝenevo la 14-an de junio 1986. ■

Laŭde al la Ombro

Tiu poemo aludas al la iom-post-ioma blindiĝo, kiu ekde juna aĝo longe malsanigis la poeton

Maljuneco (tiel aliuloj ĝin nomas) povas esti nia tempo de feliĉo. La animalo mortis, aŭ preskaŭ mortis. Restas la homo kun sia animo. Mi vivas inter formoj lumaj kaj malprecizaj, kiuj ankoraŭ ne estas plennallumo. Bonaero, kiu iam etendis sin kiel ĉirkaŭurboj, direkte al senfina ebena, denove estas La Recoleta, La Retiro, la malprecizaj stratoj de La Once kaj la eluzitaj malnovaj domoj kion ankoraŭ oni nomas Sudo. Ĉiam en mia vivo estis treegaj la aferoj; Demokrito el Abdero elpikis al si la okulojn por pli bone pensi; la tempo estis por mi Demokrito. Tiu duonmallumo estas lanta kaj ne dolora; ĝi fluas laŭ milda deklivo kaj similas al eterneco. Miaj amikoj ne havas vizaĝon, la virinoj samas kiel antaŭlonge, la stratanguloj eble aliĝis, ne estas literoj surpaĝe de la libroj. Ĉio tio devus timigi min, sed ĝi estas ia ĝuo, ia reveno. El la generacioj de surteraj tekstoj mi legis nur kelkajn, kiujn mi daŭre legas laŭmemore, daŭre legas kaj transformas. El Sudo, el Oriento, el Okcidento, el Nordo konverĝas la vojoj min kondukintaj al mia sekreta centro. Tiuj vojoj estas eĥoj, paŝoj, virinoj, viroj, agonioj, resurektoj, tagoj kaj noktoj, intersoniĝoj kaj sonĝoj, ĉiu eta momento de la hieraŭo kaj de la hieraŭoj de la mondo, la senŝancela glavo de la dano kaj la luno de la perso, la agoj de la mortintoj, la kundividita amo, la paroloj, Emerson kaj la neĝo, kaj tiomaj aferoj. Mi povas nun ilin forgesi. Mi venas al mia centro, al mia algebro kaj al mia ŝlosilo, al mia spegulo. Baldaŭ mi scios, kiu estas mi.

Preĝo

Mia buŝo elparolis kaj elparolos, milojn da fojoj en la du idiomoj al mi intimaj, la Patronian, tamen nur partece mi ĝin komprenas. Hodiaŭ matene, la unuan de julio 1969, mi volas provi preĝon personan, ne hereditan. Mi scias ke tio estas tasko postulanta sincerecon preskaŭ superhoman. Evidentas, unue, ke peti estas al mi ne konsentite. Peti nenokiĝon de miaj okuloj estus sensencaĵo; mi scias pri miloj da homoj vid-kapablaj, kiuj ne pro tio estas speciale feliĉaj, justaj aŭ saĝaj. La procezo de la tempopaso estas interplekto de efikoj kaj kaŭzoj, tiel ke peti kion ajn, eĉ la plej etan, estas peti ke rompiĝu ĉeno de tiu fereca plektaĵo, estas peti ke ĝi estu jam rompita. Neniu meritas ĉi miraklon. Mi ne povas petegi, ke al mi estu pardonitaj la eraroj; pardoni estas aliula faro, kaj nur mi povas min savi. Pardonu elpurigas la ofenditon, ne la ofendinton, kiun preskaŭ ĝi ne koncernas. Liberdecido mia estas eble iluzio, tamen mi povas doni, aŭ revii ke mi donas. Mi povas doni kuraĝon de mi ne posedatan; mi povas doni esperon en mi ne troviĝantan; mi povas lernigi la deziron lerni, kion mi apenaŭ scias, aŭ apenaŭ travidas. Mi volas resti en aliulaj memoroj malpli kiel poeto ol kiel amiko; ke iu ripetu iun kadencon de Dumbar aŭ de Frost, aŭ de la homo kiu noktomeze vidis la sangantan arbon, la Krucon, pensante ke li unuafoje ilin aŭdis el miaj lipoj. La cetero al mi ne gravas; mi esperas ke la forgeso ne malfruos. Oni ne konas la determinojn de la Universo, sed oni scias, ke rezoni klarvide kaj agi juste estas helpi al tiuj determinoj, kiuj ne estos al oni revelaciitaj. Mi volas tutece mortii; mi volas mortii kun tiu kunulo, mia korpo.

La du suprajn poemojn de Borges esperantigis Neusa Priscotin MENDES, el la hispana lingvo helpe de traduko en la portugala lingvo

Ĉu kopirajto mortigas Esperanton?

ALEKSANDER OSINCEV, RUSIO

Komence mi ŝatus klarigi terminojn. Mi distingas inter aŭtorrajto kaj kopirajto. Aŭtorrajto estas rajto de aŭtoro pri intelekta propraĵo, kiu fiksas la aŭtorecon de unika esprimo de iu ideo aŭ fakto. Kopirajto estas la rajto kopii, distribui kaj transsendi verkon (inkluzive elsendon), rajto komerci per ĝi aŭ krei ties devenaĵojn, rajto juĝprocesi por eldevigi la ĉi-antaŭe menciitajn rajtojn kaj rajto transdoni la ĉi-antaŭajn rajtojn al aliuloj [el Vikipedio].

La disdivido celas atentigi pri la ekzisto de du flankoj, kiuj ĝis nun estis kaŝitaj, tamen subkomprenataj en unu anglalingva termino copyright.



Problemo

Oni povas sufiĉe longe diskuti pri la senco de kopirajto, kiun kelkaj ekopiniis fundamenta, malgraŭ ke antaŭ cent jaroj ĝi ne ekzistis leĝe. Oni povas sufiĉe serioze opinii, ke la kopirajto subtenas la evoluon de kulturo, tamen oni forgesas, ke la foresto de kopirajto fiksita en la leĝaro ne malhelpis kaj foje eĉ multe helpis al la evoluo de kulturo dum jarcentoj. La moderna kulturo ne estas esence nova kaj freŝa, ĝi ĉiam estas miksaĵo de io jam travivita, vidita, aŭdita, spertita. Ne eblas krei ion, kio ne ekzistas sur la Tero. Eĉ la plej teruraj kaj strangaj vivaĵoj el fikciaj aŭ fantastaj libroj estas nur kolekto de jam konataj trajtoj kaj partoj de la ekzistantaj. La ideoj de iuj aŭtoroj inspiras aliajn aŭtorojn pri kreado surbaze de tiuj ideoj.

Kaj la kopirajto en tiuj kondiĉoj estas baro por kreantoj. Ĝi malpermesas uzi jam ekzistantajn ideojn por fari propran esprimon de tiuj ideoj. La tuta sistemo de kopirajto en la unua vico nutras ne la aŭtoron, sed la rajtoposedantaj distribuantojn, kiuj ricevis permeson distribui kaj vendi la verkon. Ĝuste ili decidas, kie kaj kiel vendi la verkon, ĉu traduki la verkon en fremdan lingvon, kaj en kiun lingvon preferi oni traduku por fine ricevi pli grandan profiton.

Kial kopirajto mortigas Esperanton?

Ĝuste en tiu punkto kopirajto mortigas Esperanton. Mi ne ŝatus diri, ke kopirajto minacas la ekziston de Esperanto, sed kopirajto minacas la E-kulturon. La kulturo

fakte estas la etoso de ekzisto de la lingvo.

La tutmonda E-komunumo, ne multnombra, kvankam komparebla kun malgranda ŝtato, estas geografie disigita, ne havas evoluintan merkaton de varoj. Oni ne povas esperi pri sukcesaj vendoj de ĵus aperinta libro aŭ muzika KD. Ni havas klarajn ekzemplojn de malsukceso: Internacia Televido, la Imagu-Filmo kaj eĉ la Libroservo de UEA, kiu ne celas profiton kaj fakte ne estas profita. La ekzistantaj vendejoj, retbutikoj estas nur karikaturo de negoco, ili ekzistas pro entuziasmo de siaj posedantoj.

Ni ne povas esperi pri la grandaj kvantoj de la kreataj originalaĵoj kaj pri la aktualaj tradukaĵoj ni ne povas esperi ĝuste pro kopirajto. Mia sperto de komunikado kun distribuantoj de filmoj klare montras kelkajn problemojn.

Unue, la E-merkato pro siaj kripleco kaj malgrandeco ne interesas la distribuantojn.

Komence ili ne scias pri Esperanto entute. Tamen post la klarigo kaj prezento de la moderna stato de la internacia lingvo kaj prezento de kelkaj bonaspektaj kaj seriozaj projektoj, oni demandas pri komerco kaj tiam mi ne povas prezenti la esperantistojn pagipovaj.


Due, la sistemo de distribuado estas bazita sur disdivido kaj vendoj de licencoj laŭ geografia principo. Oni vendas licencon por distribuado en iu konkreta lando aŭ eĉ samlingvaj landoj, se tie oni parolas la lingvon de la tradukota verko. Do, por distribui la kopirajtitajn verkojn en Esperanto mi devus aĉeti tiom da licencoj en kiom da landoj mi distribuos. Pro la malmulteco da esperantistoj kaj malmultaj vendoj tiu distribuado iĝas sensenca el financa vidpunkto. Certe mi ne parolas pri apartaj licencoj, kiam eĉ por unu

lando oni vendas kelkajn licencojn. Por filmoj oni vendas licencon pri distribuado per DVD-oj, televido kaj kinejoj. Sed tio ne koncernas la Esperanto-movadon.

Pro la menciitaj problemoj mi ne povas ricevi licencon por unu franca filmo, malgraŭ ke la filmokreantoj rezignis pri la aŭtorrajto kaj kopirajto. Tamen la distribuanto de la filmo prisilentas la permeson kunlabori kaj ne respondas informpetojn. Pro la kopirajto ne povas aperi libro "Hari Poter kaj la ŝtono de la saĝuloj", malgraŭ ke la traduko pretas kaj ĝi estas bona, malgraŭ ke multaj E-eldonejoj anoncis sin pretaj presi la libron. La kopirajto baras grandegan parton de tradukebla nacia kulturo aŭ igas esperantistojn pirati la verkojn, kio ne kreas bonan impreson pri tiuj.

Esperoj kaj solvoj

Tamen ekzistas eliro kaj espero, ke la E-kulturo ne mortos, sed riĉiĝos



en aliaj manieroj. Kaj koncerne la filman kulturon mi ŝatus skizi la sekvajn solvojn. Unue, uzi kaj subteni verkojn, al kiuj estis atribuita unu el la permesoj de Krea Komunaĵo (Creative Commons). La movado ĉirkaŭ la liberaj aŭ duonliberaj licencoj kreskas kaj disvastiĝas, kio bone

influas la kvaliton kaj la kvanton de verkoj laŭ tiuj licencoj.

Due, la novaj manieroj distribui la enhavon pere de interreto viŝas la limojn inter landoj kaj kontinentoj. Interreto aperas en pli multe da landoj, eĉ tre malfortaj el ekonomia vidpunkto. La evoluo de interreto permesas transdoni grandajn dosierojn de alta kvalito. Trie, ankaŭ la internaciaj pagsistemoj rapide evoluas kaj tio signifas, ke la ricevo de profito far kreantoj sendepende de distribuantoj ne plu estas problemo. Kvare, la evoluo de teknikaj aĵoj por simplaj uzantoj, mikrofonoj, komputiloj, poŝtelefonoj, fotiloj, programaro, ĉio permesas al ĉiu komenci krei propran verkon. La grandegaj kaj senpagaj retejoj, ekz. youtube.com, permesas kundividi sian verkon kun aliaj esperantistoj tra la mondo kaj ricevi komentojn. La sociaj retoj kiel Facebook.com kreas grupojn de interesiĝantoj, kiuj servos kiel distribuantoj de la verkoj. ■

FACILA



Aktori: Belega sperto por ĉiuj!

ALESSANDRO DE FILIPPIS, ITALIO

Antaŭ kelkaj jaroj, mi proksimiĝis al la teatro-mondo: ne kiel spektanto sed kiel aktoro, amatora aktoro - ne profesia. Ĉi tiu sperto estis, kaj ankoraŭ hodiaŭ estas, tre emocia.

Kiam oni estas en-scena, oni estas kun sia vizaĝo, sia voĉo, siaj brakoj, gamboj k.t.p. La voĉo, ekzemple, estas esenca ilo por aktori kaj malfacile estas

ĝuste uzi ĝin. Emocio malhelpas aktoron kaj li foje eraras

Emocio estas danĝera ankaŭ por la memoro, tial aktoro povas ne memori kelkajn frazojn kiujn li devas elparoli.

Tamen, kiam oni komencas venki la malbonan emociion kaj uzi la bonan, tiam oni povas atingi altan nivelon de komunikado kun la spektantoj.

Malmultaj spertoj starigas vin en la mezo de multaj homoj kiuj silente, senespere, sian emociion donas al vi kaj la vian prenas enŝanĝe. Lasta-tempe, ĉiutage ni devas vivi laŭ la sociaj reguloj: ne laŭte paroli, ne surhavi strangajn kaj malbelajn vestaĵojn k.a. Kiel aktoro oni povas salti kiel infano, krei, marŝi kiel militisto k.t.p. Mi sugestas tiun sperton al ĉiuj. ■

aktori: ludi en teatraĵo aŭ kino

amatora: neprofesia

profesio: vivrimeda okupo

en-scena: ludanta apartan parton de teatraĵo

gambo: la tuto de la suba membro de homo

danĝera: ebleco de malbono, de malfeliĉo

memoro: kapablo konservi kaj denove prezenti al la konscio

frazo: kunaĵo da vortoj prezentanta kompletan sencon

esenca: gravega

spektantoj: tiuj, kiuj rigardas kaj aŭskultas tion, kion oni prezentas en teatrejo, kinejo, cirko ktp.

laŭte: forte kaj intense pri sonoj



de Sebastian Oehler El Blogo "Komiksoj"
<http://komiksoj.wordpress.com> – la pa aro estas kreita de grupo el la germana forumo de la pa aro Lernu!



Biero kaj vermo

Instruisto pri kemio volis instrui al siaj lernantoj la malbonaĵojn kaŭzitaĵajn de la alkoholaĵoj kaj prilaboris eksperimenton, kiu enhavis unu glason da akvo kaj unu da biero kaj du vermojn.

- "Atenton nun, lernantoj! Rigardu la vermojn, diris la instruisto dum li metis unu en la akvon.

La estaĵo naĝis trankvile en la akvo, kiel se ĝi gaje ludas.

Poste, la instruisto metis la alian vermon en la duan glason, kiu enhavis bieron.

La besteto sin kunvolvis, abrupte tordiĝis, kiel se ĝi volegas eliri el la likvaĵo kaj tuj poste dronis kiel roko.

Kontenta pri la rezultoj, la instruisto demandis:


Kiun instruon oni povas lerni el tiu eksperimento?

Joĉjo levis la manon kaj saĝe respondis:

- "Tiu kiu trinkas bieron... ne havas vermojn!"

Ed & Pris

Originala bildstrio de Éder Benedetti / Brazilo



LA PLEJBONON DE LA
 ESPERANTO-MUZIKO VI
 TROVAS NUR EN UNU LOKO...

aĉetu originalajn diskojn
vinikosmo



FONDUSO PARTOPRENU UK-N



Ĉiujare, la Internacia Junulara Kongreso de TEJO (UK) kunigas centojn da junuloj el la tuta mondo. Bedaŭrinde por multaj junuloj estas malfacile aŭ maleble akiri la rimedojn por pagi vojaĝon al la kongreso. Tial estis kreita la fonduso Partoprenu UK-n.

POR KIU?

La fonduso Partoprenu UK-n celas membrojn de TEJO kiuj ne disponas je la rimedoj por pagi siajn vojaĝon aŭ/kaj kotizojn, kaj kiuj volas aktivi en TEJO aŭ aktive kontribui al la UK. Prioritaton ĝuas junuloj kiuj ankoraŭ neniam partoprenis UK-n.

La enspezfontoj de la fonduso Partoprenu UK-n estas:
 * eventuala profito de la pasinta UK
 * donacoj de Esperantistoj

KIU FONTOJ?

Se vi volas subteni la fonduson Partoprenu UK-n kaj helpi al junaj Esperantistoj eniri la Esperanto-mondon, vi povas simple transpagi sumon per via UEA-konto al la konto tejjik kun indiko „Fonduso Partoprenu UK-n“.

6 Kontraŭ-ŝtelistaj akcesoraĵoj

Ni ĉiuj havas diversajn akcesoraĵojn, kiuj tre gravas al ni pro la utileco, per kiu ili provizas nin aŭ eble pro iu intima persona kialo. Ĉiel ajn, ni ne ŝatas kiam venas iu kaj tuŝas niajn personajn

propraĵojn. Des pli malbone se oni ŝtelas ilin...

Por eviti tiajn malbonajn situaciojn ni kolektis kelkajn kontraŭ-ŝtelistajn akcesoraĵojn, kreitajn por helpi personojn kaŝi aŭ malbeligi

siajn aĵojn por ke ili fariĝu malpli allogaj por naivaj okuloj. Ne estas garantio ke la akcesoraĵoj ĉi-sube ja funkcios kontraŭ ŝtelistoj, sed pro ili oni almenaŭ pensos dufoje antaŭ ol preni viajn aferojn.



Malbela Fotilo

Kiam vi vojaĝas, promenas dum la tago aŭ simple ŝatas kunporti vian kameraon ĉien, mi certas ke vi zorgas timante ke ĝi povus esti rabita aŭ ŝtelita. Mojosa maniero eviti potencialajn ŝtelistojn kaj fotilrabistojn estas malbelaĉigi ĝin... alivorte, aspektigu vian fotilon kiel senvalora, malnova kaj aĉa.



La kontraŭ-ŝtelista ŝtopiltaso

Tiu ĉi interesa kontraŭ-ŝtelista taso estas mojosa maniero malebligigi viajn kolegojn uzi vian tason kiam vi estas for aŭ kiam vi malsanas. Per simpla ŝtopilo, kiun la posedanto povas demeti post la uzo, la taso fariĝas neuzebla. Tio estas, nur se iu uzos la proprajn fingrojn por ŝtopi la truon.

Kontraŭ-ŝtelistaj lunĉsaketoj

Eble vi jam spertis la malaperon de via lunĉo pro iu nekonata kaj mistera kolego ĉe la laborejo. Ĉar ne eblas instali video-kameraon ene de la fridujo, tiuj lunĉsaketoj povas solvi vian problemon. La saketoj havas verdajn makulojn ĉe ambaŭ flankoj, do kiam sandviĉo estas enmetita en la saketon, ĝi aspektos kiel malnova kaj putra. Tiuj mirindaj lunĉsaketoj certe tenos viajn laborkolegojn for de via lunĉo.



Kontraŭ-ŝtelistaj gluaĵoj

Unuavide tiuj gluaĵoj ne aspektas kiel granda afero, sed pensu pli bone: Ŝtelisto preferus serĉi "pli belan" kaj novan biciklon ol riski esti arestita pro iu skrapita kaj malnova biciklo. La kontraŭ-ŝtelistaj gluaĵoj estas bonegaj kreaĵoj uzebaj por via biciklo, motorciklo aŭ aŭtomobilo. Kial ajn vi volas malbeligi aĵon vian, tiuj gluaĵoj ebligas facilan solvon.

Ĵurnala komputilujo

La ĵurnala portebla komputilujo ebligas al vi elekti inter 5 malsamaj ĵurnaloj (en 5 malsamaj lingvoj) kaj aspektas kiel mojosa ideo. Sed ĉu la personoj fakte ne rimarkos ke la artikoloj ne ŝanĝiĝas ĉe post semajnoj, monatoj aŭ jaroj?



Kasedila lpuĵo de la 80aj jaroj

Jen bonega solvo por tiuj, kiuj sentas sin minacataj enviuloj, kiuj rigardas lpuĵojn de aliaj. Tiu ĉi interesa ujo omaĝas malnovajn muzikajn ilojn, ĉar ĝi uzas malnovan kasedujon kiel ujon por moderna mp3-ludilo. Dum ĉiuj promenas kaj aŭskultas siajn lpuĵojn, vi povas tute trankvile esti ekster la radaro de ruzuloj, ĉar via ilo estas vere malnova - kiu ankoraŭ aŭskultas kasedojn nuntempe?

KIEL KONTRIBUI?

Kiel sendi kontribuojn al Kontakto?

- * Se vi havas ion interesan enmense, ne atendu ke ni proponu temojn, simple verku. =)
- * Kontakto bonvenigas artikolojn pri ĉiuj temoj, sed la plej ŝatataj temoj laŭ la legantoj estas: Lingvoj, tutmondaj problemoj, vojĝoj, humuro, literaturo, poezio, arto kaj kulturo.
- * Faru mem viajn proprajn intervjuojn. Se vi konas interesan homon, prefere ne ligita al Esperanto-movado, intervjuu kaj sendu al ni.
- * Klopodu verki vian artikolon ne kiel unua persono. Legu kelkajn raportojn en aliaj revuoj por ke vi inspiriĝu.
- * Esploru eksterajn informojn pri la temo de via artikolo, tio riĉigos ĝin.
- * Se eblas, faru kelkajn demandojn pri la temo al aliaj homoj kaj inkluzivigu la respondojn en via artikolo. Tio multege riĉigos ĝin.
- * Viaj komentoj en nia retpaĝo aŭ en aliaj sociaj retoj povas esti uzataj en la papera versio de la revuo.
- * Sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan.
- * Se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi.
- * Movadajn raportojn sendu al tejo-tutmonde@tejo.org
- * Indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo.
- * Fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigra-blankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- * Dikajn kovertojn prefere sendu registritaj.
- * Rete bonvolu sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTF (unikode aŭ x-kode por supersignaj literoj); bildojn - kiel JPEG (150-300 dpi)
- * Ilustraĵoj kaj adresoj en la interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre bonvenaj!

Ĉu KONTAKTO plaĉas al vi?

Se jes, abonu ĝin por vi, por viaj geamikoj kaj por viaj kursanoj.

Ĝojigu nun vin mem aŭ vian amikon per donaco, kiu alvenas la tutan jaron!

Se vi estas kursgvidanto au klubestro, vi ricevas 20% da rabato je kolektiva abono (sufiĉas 6 abonoj).

Se ni sendas ĉiujn ekzemplerojn en unu pako al unu adreso, la rabato estas 40%!

Abonu kaj abonigu nun ĉe [kontakto.tejo.org!](http://kontakto.tejo.org)

KOTIZTABELO DE UEA POR 2011

La jenaj tarifoj validas ankaŭ por postaj jaroj, se la pago estos farita antaŭ la 30-a de septembro 2011

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	14	36	90	54	32	180
Aŭstrio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Belgio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Brazilo/eŭro	5	12	31	19	11	62
Britio/pundo	8	20	50	32	19	100
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	670	400	2100
Danio/krono	70	180	450	285	170	900
Estonio/eŭro	7	17	42	27	16	84
Finnlando/eŭro	10	25	61	38	23	122
Francio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Germanio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Greklando/eŭro	8	20	50	32	19	100
Hispanio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Hungario/forinto	1750	4400	11000	7000	4200	22000
Irlando/eŭro	10	25	61	38	23	122
Islando/eŭro	10	25	61	37	22	122
Israelo/eŭro	7	18	46	28	17	92
Italio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Japanio/eno	1120	2800	7000	4200	2520	14000
Kanado/dolaro	14	34	85	51	31	170
Latvio/lato	4	11	27	17	10	54
Litovio/lido	20	50	130	80	50	260
Nederlando/eŭro	10	25	61	38	23	122
Norvegio/krono	80	200	500	300	180	1000
Nov-Zelando/dolaro	18	46	115	69	41	230
Pollando/zloto	25	60	150	95	55	300
Portugalio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Rusio/eŭro	5	12	31	19	11	62
Slovakio/eŭro	7	17	42	27	16	84
Slovenio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Svedio/krono	95	240	600	380	230	1200
Svislando/franko	14	34	85	51	31	170
Usono/dolaro	13	32	80	48	29	160
TARIFO A/eŭro	6	16	41	25	15	82
TARIFO B/eŭro	5	12	31	19	11	62

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgo laŭ Belgio; Kipro kaj Malto laŭ Slovenio.

TARIFO A: Bahamoj, Honkongo, Korea Respubliko, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MG: Membro kun Gvidlibro kaj monata reta novaĵbulteno.

MJ(-T): Membro kun Jarlibro kaj la revuo Esperanto rete (kaj ĝis inkl. 29 jaroj membro en TEJO kun Kontakto sen plia pago).

MA(-T): Membro-Abonanto kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto.

DM(-T): Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon Esperanto, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon Kontakto.

DMJ(-T): Dumviva Membro kun Jarlibro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MJ; ricevas la Jarlibron kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membrecon en TEJO kun Kontakto.

SA: Simpla abono al la revuo Esperanto, sen membreco en UEA.

Kto: Abono al la revuo Kontakto, sen la membreco en UEA/TEJO.

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA).

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon Kontakto kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO.

67-a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto

<http://www.ijk-67.retejo.info>

UKRAINIO

2011

14a - 27a de Julio



nenio plu estos la sama



nova

KONTAKTO

kontakto.tejo.org

Venis la nova revuo Kontakto!